REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 2 (51) aprilo 2009*



en la numero

VER, TEMoj kaj aliaj estontaj aranĝoj
LF en Uljanovsk kaj Peterburgo
nacia frazeologio E-veste
raport-reelekta Konferenco de REU
novaj libroj de "Impeto"
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2009

enhavo:

01 VER-14
01 Tiĥvinaj Esperantistaj Metiejoj invitas vin
02 La sepa LF en Uljanovsk
04 La tria LF en Peterburgo
05 "Apero-4": kio nova?
08 Uljanovskaj esperantistoj festas...
10 Centjara jubileo de Boris Sokolov
12 Rusaj esperantistoj en Aŭstralio
14 Testo pri pluralismo
15 Nacia frazeologio E-veste
19 Raport-reelekta Konferenco de REU
19 Prezidanta raporto
22 Malferma letero al REU-Konferenco
24 Generaloj sen armeo
25 Membrostatistiko de UEA en 2008
25 Membrostatistiko de REU
25 Novaj REU-membroj por 2009
27 Kotizoj de REU/REJM por 2009
28 TEJO informas pri estontaj aranĝoj
28 E-kurso en Surgut
29 Kultura Esperanto-Festivalo
30 Printempa renkontiĝo en Hanojo
30 Esperanto sur 64 milionoj da balotiloj
32 Libroservo de UEA vendis por 125125 eŭroj
33 La urbo Goblinsk (nova ĉapitro)
38 Novaj versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
40 "In memoriam..."
24, 29, 31 Anekdotoj
k3 Funebra sciigo el Latvio
k4 Novaj libroj de "Impeto"



LF en Peterburgo

REGo
(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (51) aprilo 2009

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2009:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 300 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*



Ljonja Borisov

Tiu birdo malica
Ja ne havas preferon –
Eble mi estos vica,
Kiu lasos la Teron.
Sed fieros kun beno
Mi ĝis la vivofino,
Pri la verda ĝardeno –
Nia glora destino.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)



Olga Semjonova

FUNEBRA SCIIGO EL LATVIO

Kun granda malĝojo en la koro mi anoncas, ke la 2-an de aprilo post longa kaj malfacila malsano en Rigo forpasis estrarano de Latvia Esperanto-Asocio, konata latva esperantisto Aristids Medinŝ (nask. 31.08.1944). A.Medinŝ estis longjara aktivulo de Latvia Esperanto-movado, organizis multajn Esperanto-aranĝojn, inter ili ankaŭ la popularan printempan renkontiĝon "Neĝfloketo", gvidis la Esperanto-klubon "Radieto", okupiĝis pri eldonado de Esperanto-libroj, glumarkoj, insignoj k.a., estis membro de la redakcia komisiono de "Latvia Esperantisto". Dum pli ol tri jardekoj li estis individua membro de UEA, Delegito por Rigo. Lia morto estas grandega perdo por Latvia Esperanto-Asocio kaj por ĉiuj, kiuj konis tiun ĉi sinceran, amikeman kaj modestan homon.


Margarita Želve, prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio

Multaj malnovaj esperantistoj el Rusio kaj aliaj landoj de eksa USSR tre bone konas Ariston kaj memoras lian bonkoremon kaj aktivan agadon ankoraŭ dum la sovetia tempo (en 1970-73 kaj 1977-79 li estis komitatano de SEJM). Lia forpaso estas granda ĉagreno ankaŭ por niaj koroj. (La redakcio)




Aristo Medinŝ kun la filino Alise

Novaj libroj de “IMPETO”



István Nemere. **Jesa.** Originala romano. – “Impeto”, 2009. – 184 paĝoj.

En malgranda urbeto, kiu situas rande de dezerto, post sabla tempesto aperas stranga virino. Iuj opinias ŝin nova Mesio, aliaj – pseŭdoprofeto, eĉ fripono. Ŝi allogas dek du disĉiplojn, preferante elekti el la plej malestimataj urbanoj. Ŝiaj adeptoj iĝas la loka Casanova, trompisto-almozulo, bubo-trampo, narkotulino, pastro-hipokritulo. Jesa ne disvastigas speciale bonagojn aŭ miraklojn, ŝi vidas homojn trae, inklinas ilin ŝanĝiĝi. Kompreneble, okazas konflikto inter ŝi kaj urbaj aŭtoritatuloj...



Sergej Lukjanenko. **Kavaliroj de Kvardek Insuloj.** – “Impeto”, 2009. – 224 paĝoj.

Tradukis el la rusa Svetlana Smetanina, Mikaelo Ĉertilov. Redaktis Mikaelo Bronŝtejn, Elena Ŝevĉenko. En la libro debutis juna pentristino Maria Lazareva el Vorkuta.

La aventura romano apartenas al fruaj verkoj de la aŭtoro. La dekkvarjara knabo, Dima, subite trafas en mirindan mondon – la Mondon de Kvardek Insuloj, en kompanion de preskaŭ samaĝuloj el diversaj landoj. Tie li renkontiĝas kun Inga, lia konatino el la Tera vivo. La vivo sur la insuloj evidentiĝas kruela kaj tute ne infaneca. La gejunuloj estas devigataj batali por defendi siajn vivojn kaj la vivojn de siaj nevolaj kunuloj. Diversmaniere riveliĝas iliaj karakteroj kaj agoj. Amo, heroaĵo, amikeco kaj sindonemo najbaras kun perfido, malkuraĝo kaj perforto.



Rusa-Esperanta biblia frazaro. – “Impeto”, 2009. – 184 paĝoj.

Kompilis Aleksandr Ŝevĉenko, redaktis Viktor Aroloviĉ.

La vortaro unuigas bibliajn frazojn, renkonteblajn en la rusa literaturo kun ekzemploj el la Malnova Testamento (la klasika traduko de L.Zamenhof) kaj la Nova Testamento. La frazaro ne nur donas tradukojn de la frazoj, sed ankaŭ ebligas iom profundiĝi en la biblian tekston dank’ al ekzemploj kaj pripensi eblajn variantojn de la traduko. La kompilinto kaj la redaktoro dediĉis la libron al la 150-jariĝo de L.L.Zamenhof.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)

VER-14

Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi aŭdas birdajn trilojn? Kaj krakadon de lastaj glacieroj sur la rivero? Kaj gajan esperantistan babiladon apude? Ĉu vi sentas tiun printempe ebriigan aeron, kiu trapenetras ĉiun korperon kaj inspiras per neforgesebla humoro? Denove la verda stelo vokas ĉiujn samideanojn al la renkontiĝo. Al VERo.

La 14-a Volgia Esperantista Renkontiĝo okazos de la 30-a de aprilo ĝis la 3-a de majo 2009 apud Samara. Ĝi celas unuigi kaj revivigi esperantistojn de Volgia regiono kaj apudaj teritorioj.

Loko: la turbazejo "Romaŝka" situas en pitoreska pina arbaro apud la rivero Sok, proksime de ĝia enfluo en Volgon. Ĝi estas bone atingebla per busoj kaj elektrotrajnoj de Samara kaj de la flughaveno.

Loĝado kostos por tagnokto: 230 r. – ĉambroj por 8-12 personoj kun dunivelaj litoj; 320 r. – ĉambroj por 2 personoj (la oportunaĵoj estas en koridoro); 400 r. kaj 500 r. – ĉambroj respektive por 4 kaj 2 personoj kun apartaj oportunaĵoj (duŝo, necesejo) por la ĉambro. Sur la teritorio oni permesas starigi tendojn kontraŭ 100 r.

Manĝado en la manĝejo nun kostas 300 r. (matenmanĝo – 70, tagmanĝo – 130, vespermanĝo – 100). Ĉu la kosto altiĝos en majo, nun neniu povas diri. (Ni esperu, ke ne.) Eblas memzorga manĝado, ĉar proksimaj nutraĵvendejoj atingeblas dum 20 aŭ 40 minutoj perpiede.

Aliĝkotizo: 100 r. ĝis 01.04; 200 r. ĝis 15.04; 300 r. post 15.04 kaj surloke. Estas rabatoj pro kontribuo al la programo.

La programo konsistos el seriozaj aferoj (ronda tablo pri regiona agado, konatiĝo kun la agado de Samara E-klubo, diversaj prelegoj kaj informoj), distraj programeroj (ludoj, kvizoj, koncertoj, turista marŝo al la monteto Cara Kurgano, eble ekskurso tra Samara), manlaboraj metiejoj, ekologia marŝo kaj ankoraŭ kelkaj eroj. Detala programo estas nun preparata. Se venos multe da infanoj, okazos apartaj programeroj por ili.

Ĉi tiu informo troviĝas ankaŭ en <www.reu.ru>, kie Vi povas plenigi aliĝilon. Pri demandoj kaj proponoj bonvolu skribi al <espersam@yandex.ru> aŭ telefoni +7-906-1273516 al Kuznecova Jelena.

TIĤVINAJ ESPERANTISTAJ METIEJOJ INVITAS VIN!



Karaj geamikoj,

Konsiderante la hodiaŭan staton de preparaj aferoj ni povas konvinkite deklari: Tiĥvinaj Esperantistaj Metiejoj okazos. Tion garantias ne nur la kvanto (je la 1-a de aprilo aliĝis 51 personoj el 5 landoj), sed ankaŭ la kvalito de la TEM-kompanio. Ni esprimas koran dankon al la plej aktivaj aliĝintoj, kiuj faris interesajn programproponojn kaj anoncis sian pretecon organizi, kunlabori, prelegi, koncerti.



Ni speciale ne agitu vin aliĝi – la plej bona agitado por via aliĝo estos konatiĝo kun la programproponoj, jam alvenintaj. Ankaŭ viaj proponoj estas tre bonvenaj. Aktivaj kontribuontoj por la programo ricevos monsubvenciojn. Brila areto de aliĝintaj perfektaj artistoj fakte plenigas vesperajn programojn kaj esperigas pri speciala koncerto por neesperantista publiko en la urba kulturdomo. Jam estas dudeko da sinanoncintoj por ekskurso al Velikij Novgorod – tio sufiĉas por ke la ekskurso okazu, sed, kompreneble, dume restas en la buso lokoj ankaŭ por vi.

Kun bedaŭro, pardonpetante, ni devas informi vin, ke ĉiuj luksaj apartamentoj estas jam distribuitaj inter la unuaj mendintoj. Restas tamen konvena gamo da loĝvariantoj por diversgrandaj monujoj, kaj ni ne dubas, ke vi trovos loĝlokon konvenan – bonvolu elekti en la retejo. Se vi tamen insistas pri la plej luksaj kondiĉoj, bonvolu skribi al ni. Eblas mendi por vi lokojn en luksa arbara hotelo, 3 km for de la TEMejo. Kompreneble, se vi pretas pagi por ĝi kaj fari belajn promenojn ĉiutage aŭ pripagi ankaŭ vian matenan veturigon al la TEMejo kaj vesperan/noktan al la hotelo.

Vi povos ankaŭ etpreze resti por kelkaj tagoj en Sankt-Peterburg antaŭ aŭ post TEMoj. Peterburgaj esperantistoj okupiĝas pri organizo de via restado.

Aktualajn informojn trovu en la retejo de TEMoj <http://notlibro.info/> kaj aliĝu por ne preterlasi restadon en bona loko kaj bona kompanio!

Loka organiza teamo

JAM LA SEPA!

Nun ĝi finiĝis, nia tradicia Lingva Festivalo, organizita de Uljanovska E-klubo kaj la fremdlingva fakultato de Uljanovska pedagogia universitato. Jam la 7-a! Ree renkontiĝis malnovaj geamikoj kaj aperis la novaj... La festo daŭris du tagojn. Komence en la universitato, poste en la klubejo.

Dum la festa malfermo niaj festgvidantoj Irina Platonova kaj Irina Kolesniĉenko konatigis la ĉeestantojn (pli ol 250) kun la festivala programo.



prezentado de la lingvo "Efik"

Jevgenija Muĥina voĉlegis la gratulon el Iĵevsk de Bronislav Ĉupin, kiu deziris al nia festivalo fruktodonan laboron kaj multajn sukcesojn. Niaj geamikoj el Ĉeboksari, gvidi-

taj de Anton Konstantinov, kiu prezentis dum la festivalo la finnan lingvon, supreniris la scenejon sesope por saluti la festivalon. Telefone gratulis nin Dmitrij Porfirjev, kiu prezentis pli frue la ciganan lingvon. Nun li servas en armeo kaj revas partopreni la sekvan Lingvan Festivalon.

Montritaj estis 32 programoj, preparitaj de niaj studentoj, studentoj de Teknika Universitato, de la sociala-pedagogia lernejo № 1 kaj ankaŭ fremdlandanoj. Tre multaj homoj vizitis la prezentadojn de la germana, angla, franca lingvoj. Sukcesis la prezentadoj de la armena, hispana kaj ĉina lingvoj. Sofi (Kameruno) kaj David (Niĝerio) multfoje invitis gastojn. La prezentado de Esperanto okazis kvarfoje, kaj TV-homoj agrable pasigis tie la tempon. Irina Grebeŝĉenko, Sergej Abramov, Jurij Karcev, Dmitrij Semjonov kaj niaj novuloj Oljga Terentjeva kaj Ivan Kaĉalov kontentigis la interesiĝantojn.

Ĉiu festivalo en Uljanovsk havas sian specifecon. Ĉi-foje estis multaj. Unue, la "ĉefa" temo estis nacia manĝaĵo. Dum prezentadoj de ĉiu lingvo estis disdonitaj receptoj de naciaj manĝaĵoj. Kio estas "nacia manĝaĵo" por esperantistoj? Ili manĝas ĉion, tiel certigis niaj gvidantinoj. Sed la plej grava manĝaĵo por esperantistoj, laŭ vortoj de la gvidantino Irina Platonova, estas ekzotika frukta salato dum la Virina Tago en nia klubo. Due, Vladimir Savinov, majstro de ĉina teceremonio, dum du tagoj regalis nin per vera ĉina teo laŭ ĉiuj reguloj de tea ceremonio. Trie, malfermis siajn pordojn la poezia salono, kie vizitantoj lernis verki hajkojn, dekunuetojn kaj aliajn versaĵojn. En la salono regis Oljga Iljamakova. Post la prezentadoj okazis internacia koncerto. Dancoj (rusa, tatara kaj hinda), plenumitaj de niaj novaj amikoj el la kulturpalaco "Konstruisto", fascinis ĉiujn.



sekvataga renkontiĝo en la klubo

Dum la dua tago nia klubo akceptis ĉiujn, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Du grupoj (klubanoj kaj novuloj) laŭvice trinkis ĉinan teon kun Vladimir kaj aŭskultis lian rakonton pri diversaj teaj specoj aŭ lernis Esperanton. La programo enhavis ankaŭ filmon por komencantoj, ludojn por ambaŭ grupoj kaj kantadon. Ni aplaŭdis al nia trio (Tatjana Jevina, Tatjana Kuzmina kaj Irina Grebeŝĉenko), kantis poste komune kaj lernis novan kanton "Vi estas mia spiro", tradukitan de Tatjana Kuzmina, kaj la kluban kanton "Vi ne solas!" de Jurij Karcev.

Ankoraŭ unu bonegan tagon vivis ni en nia klubo. Novaj impresoj, novaj amikoj, novaj revoj…

Margarita Karceva (Uljanovsk)



LINGVA FESTIVALO EN PETERBURGO

La 5-an de aprilo okazis la Tria Peterburga Lingva Festivalo, organizita de la lokaj REU-aktivuloj Sergeo Andrejsons, Natalja Guseva kaj Vjaĉeslav Ivanov. Inter la grandaj novaĵoj de la festivalo estis ŝanĝo de la ejo al la pli facile atingebla, longigo de la tempo por prezentoj (de la klasika en Rusio duonhoro al 40 minutoj) kaj forigo de la manĝpaŭzo en la programo. Enketado montras, ke ĉiuj novaĵoj estis bone akceptitaj de la publiko.

En la festivalo okazis kvar prezentoj de Esperanto – tri (de Anatolo Krasnokutskij kaj Vjaĉeslav Ivanov) laŭ la plano kaj unu, laŭ la konsilo de Dennis Keefe, anstataŭ la neokazinta prezento (niakaze de la ĉina). Esperanto havis neordinare grandan atenton, multaj homoj menciis ĝin en la enketiloj, petis detalajn informojn, retadresojn ktp.

Kelkajn lernolibrojn de Esperanto ricevis lingvemuloj, gajnintaj en la lingva konkurado dum la solena fermo. Krom tio okazis prezento "Lingvokonstruado" pri moderna interlingvistiko fare de esperantisto Miĥail Kolodin, ĉefo de la Sankt-Peterburga Interlingvistika Rondeto. Prezenton "Fonologio" faris Oksana Burkina, kies ĉefa esplorkampo estas fonologio de Esperanto.

La plej sukcesa prezento de la festivalo estis tiu de la prezidanto de la peterburga societo de ingriaj finnoj Vladimir Kokko, li prezentis la finnan. Ĉiuj homoj, menciintaj en la enketiloj tiun prezenton inter la vizititaj, mencias ĝin ankaŭ kiel elstaran. Aliaj prezentoj kun relative alta rilatumo de tre kontentaj vizitintoj estas: la ĉukĉa, la kpelea, la araba, la belorusa, la udmurta, la jida, la oseta kaj la malnovslava.

Eblas konstati, ke en la vico de la tri peterburgaj festivaloj tiu ĉi estis la plej amasa, la plej bela kaj la plej sukcesa.

Grave kontribuis al ĝia sukceso aktiva partopreno de la gastiganta institucio, la Neva Instituto de Lingvo kaj Kulturo (ruse НИЯК).



la tablo de registriĝo; malantaŭe Anatolo Sidorov registras sin kiel ĵurnalisto reprezentanta "La Ondon de Esperanto"

Ili provizis al ni tion, kio ĉiam mankas por amasaj eventoj en Peterburgo, – la manojn. Dekduo da studentoj plentempe deĵoris en la ĉambroj kaj ĉe la registrejo. Certe ĉeesto de du teamoj en unu ejo kaŭzis kelkajn malglataĵojn (unu el la ĉambroj estis misindikita ks.), sed tio povus okazi kial ajn.

Nome de Rusia Esperantista Unio ni prezentis dulingvan dankleteron al la Instituto kaj la apartan persone al s-ino Jelena Arĥipova, kiu plej multe umis pri la preparo de la festivalo en la Instituto kaj eĉ elpensis novan formon de “angla gastĉambro” – plentempe funkciinta “lingva teritorio” de la angla, kie, kontraste al tradiciaj lingvaj teritorioj, oni teumis, spektis filmojn ktp.

Stabila ĉiujara okazigo de la lingva festivalo kaj la plifortiĝinta organiza teamo estis la kialo de pli serioza atento flanke de la gazetaro. Kelkaj radiostacioj (inter ili “Eĥo Moskvi v Peterburge”) anoncis la festivalon, estas planata duonhora intervjuo ĉe “Radio Peterburg”, aperas ankaŭ presitaj materialoj, interalie en la semajngazeto “Ĉas Pik” kaj la revuo por mezlernejanoj “Mig 17”.

Impresojn de la partoprenintoj eblas legi ĉe <www.festivalo.ru>. En la paĝaro estas kolektitaj ankaŭ kelkaj sondosieroj, kiuj enhavas registron de la prezentoj de la asiria, la kpelea kaj tokipono.

Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterburg)

“APERO-4”: KIO NOVA?



“Apero-4”, la tradicia renkontiĝo de la Moskva junulara esperantista klubo “EK MASI”, neatendite sukcese pasis la 7-9-an de marto 2009 en la turisma bazejo “Jerŝovo” apud Zvenigorod. Multflanke tio estis riska eksperimento, kaj ĉar ĝi bone sukcesis, indas rakonti pri ĝiaj specifaĵoj.

Iom el la historio. Novembre 2005 ni por ĉiam fermis la organizatan de la klubo regionan renkontiĝon StRIGo, kiu dum 10 jaroj iĝis la ĉefa landa novembrafesta aranĝo. Unu el la kialoj estis la fakto, ke pro troa kvanto de la partoprenintoj (la lastan jaron – pli ol 120) ne eblis sekvi la striktajn regulojn de la aranĝo, intercetere – la Lingvan Disciplinon. Aliflanke, StRIGo allogadis pli kaj pli da interesaj personoj, E-komencantoj aŭ eĉ tute neesperantistoj, kiuj proponadis belajn programerojn, sed ne povis-emis okazigi ilin en Esperanto. Dezirante rifuzi nek la E-neparolantojn, nek neesperantlingvajn programerojn, nek la Lingvan Disciplinon, ni decidis dividi la aranĝon je du. Tiel aperis la ne-Esperanta, sed poresperantista festivalo “ВсПЛЕСк” (dum la juniaj, poste – majaj festoj) kaj la Esperanta renkontiĝo “Apero” (dum la februaraj, poste – martaj festoj), kiuj jam dum 4 jaroj tre sukcese plenumadas siajn taskojn.

Nun pri la “Apero-4”. Pasintjare mi absolute ne okupiĝis pri organizado de “ВсПЛЕСк” kaj “Apero” – tion brile faris la klubaj aktivuloj kun signifa kontribuo de la ivanovaj esperantistoj. Ĉi-jare kaze de “Apero” tio ne funkciis, bedaŭrinde: neniu surprenis la iniciaton. Mi longe pigris konscii tion kaj mem ekagis nur last-momente, kiam fakte jam klaris, ke la aranĝon ni tutsimple perdas. Nu, restis por mi nenio krom organizi ĝin dum... 5 tagoj! Interesa sperto, devas mi al vi diri... Kiam estas nek la ejo, nek la programo, nek la partoprenontoj, nek la informleteroj, kiam ĉiuj klubanoj jam akceptis, ke la aranĝo ne okazos, sed ĉiuj kursfinintoj kredas, ke ĝi okazos nepre. Estas nur la propra respondeco antaŭ la novuloj, antaŭ la klubo kaj ĝia E-komponanto, antaŭ la propraj intencoj kaj promesoj... Do, 5-4-tagojn antaŭ la festaj datoj ni rezignis la ideojn iri al smolenska hotelo, brjanska kaj rjazana turismaj bazejoj, tarusa privatdomo kun surkortaj oportunaĵoj, kaj konstatis, ke ĉiuj apudmoskvaj preztaŭgaj bazejoj jam estas okupitaj. Nu – kion fari? Riski: la unuan fojon por E-aranĝo ni elektas la bazejon kontraŭ 1300 rubloj diurne – kun bonaj kondiĉoj kaj 3-foja nutrado svedmaniere. Do, sume la homoj devis pagi por 2 diurnoj averaĝe 2-3 mil rublojn (inkluzive la program-kotizon). Sed ial mi kredis, ke 20 partoprenontoj troviĝos. Troviĝis 26. Kaj tio estas pli-malpli kutima kvanto por “Apero”.



Kaj jen ni, tiuj 26 homoj, trafis tiajn kondiĉojn por la aranĝo, pri kiuj eblis nur revi. 18 el ni loĝis en 1-2-3-litaj ĉambroj en aparta dometo kun ĉiuj oportunaĵoj kaj granda komuna salono, kiu iĝis nia konstanta program- kaj etosum-ejo. La aliaj loĝis en la apudegaj dometoj. Ni povis fari ion ajn, ajnmomente kuniĝi, facile trovi ĉiun, interkonsenti pri niaj planoj kaj deziroj. Kaj paroli-paroli-paroli en Esperanto – dum la programo, en la ĉambroj, ĉetable en la manĝejo kaj promene-lude en la naturo – ĉiam-ĉiam-ĉiam... Estas kvazaŭ mirakla sonĝo... Junulara aranĝo en Rusio... kaj neniu krokodilas... Nekredeble... Pri la partoprenintoj. Tiuj estis 13 viroj, 9 virinoj kaj 4 infanoj, el kiuj 3 plenkreskaj ne-MASI-anoj, 2 el ili – aliurbanoj. La lingva nivelo prezentiĝis jene: flue parolantaj – 12 , freŝaj kursfinintoj (bonege progresantaj en parolado) – 4, pene parolantaj – 7, neparolantaj – 3 infanoj (el 4). Evidentiĝis, ke tia konsisto estas optimuma por senpene garantii la Lingvan Disciplinon (kondiĉe, ke ĉiuj estas bone motivitaj pri E-parolado) kaj garantii por la komencantoj kaj la pene parolantaj bonegan lingvan subtenon.

La programo estis kompilita el la proponoj de la aliĝintoj nokte la 6-an de

marto, la 7-an tage ni startis. Ĝi celis nenion specialan, krom ebligi al la partoprenantoj agrablan komunikiĝon. Memorante la sperton de la antaŭaj "Aperoj", mi inklinis fermi la aranĝon nokte la 8-an – por malstreĉi la homojn kaj ebligi al ili liberan komunikiĝon en la rusa, sed ĉi-foje ne estis bezono... En la unua vespero, la 7-an de marto, post la vespermanĝo, ni okazigis la Malfermon kun gaja konatiĝo kaj kvizeton pri la fonaj movadaj scioj, poste sufiĉe fervore ludis memorludon (kiam necesas parole transdonadi unu al la alia priskribon de certa bildo, vidita de la unua ludanto). Nokte, ĝis la 6-a matene, la fanatikuloj ludis "Homlupojn", nature, en Esperanto. Sekvamatene, la 8-an, ĝis la tagmanĝo estis sport-promena tempo, ĉar la bazejo liveras basenon, sketejon, skiluadon, surkortan infanludejon ktp, kaj la homoj volis kune amuziĝi, ludi, sporti aŭ simple dormi... Post la tagmanĝo la 8-an – mensaj ludoj, mezepokaj dancoj, lingva kvizo, trompludo, gajegaj surtablaj ludoj, "Aŭkcio" (nova logik-psikologia ludo, tre interesa)... Kaj belega romantika festa teumado kun floroj, bongustegaj tortoj, kandeloj, belega kantado, poste – flugigo de lanternoj surkorte. Tre bele, dankon al niaj karaj viroj! Nokte – denove "Homlupoj". La 9-an ĝis la tagmanĝo – neĝbataloj de matene kaj trompludo samsalone kun farado de guaŝ-bildetoj. Fermo tuj post la tagmanĝo – kun impresoj kaj pritaksoj de la aranĝo. Ĉiuj restis tre kontentaj, kaj la novuloj diris, ke ricevis ĉion, por kio ili venis, plus la rave amikan etoson. Jes, pri la kursfinintoj mi aparte ĝojas: ili eĉ imagi ne povas, kiel ili bonŝancis. Raraj komencantoj, kiuj ne estis seniluziigitaj pro krokodilado dum sia unua E-renkontiĝo!



Dum la Fermo ni aŭdis, ke la "Apero" memorigas la unuajn StRIGojn... Ĉu ne tion ni celis, adiaŭante StRIGojn? Ke ni revenigos ilin – sed komencante kvazaŭ de nulo. Pripensinde kaj inspire... La konkludoj: eblas trovi bonan ejon eĉ kelktage antaŭ la aranĝo – nur pagu; eblas prepari la aranĝon dum 2-3 tagoj kaj sen multaj penoj; la ravaj kondiĉoj plene kompensas sian koston; la homkvanto pro la kostoj ne falis; eblas havi senriproĉan Lingvan Disciplinon, se venas konvenaj homoj; la partoprenintoj tre bezonas la aranĝon kaj deziras "daŭrigon de la bankedo".

Plej verŝajne, la sekva "Apero" pasos samloke. Se vi estas juna, pretas sekvi la lingvan disciplinon kaj interesiĝas pri la partopreno – kolektu la monon kaj venu! Bonfarton!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

ULJANOVASKAJ ESPERANTISTOJ FESTAS...

"Amo sen limoj" – tiel nomiĝis la nova programo de Uljanovska E-klubo, dediĉita al la Tago de Sankta Valenteno, nomata ankaŭ "Tago de geamantoj". En unu el la legendoj pri tiu festo temas pri juna pastro Valenteno. Tiutempa romia imperiestro Klaŭdio la Dua bezonis soldatojn kaj malpermesis geedziĝojn, komprenante, ke edziĝintaj homoj ne iros al milito. Tamen la bonkora pastro Valenteno kompatis geamantojn kaj kaŝe geedzigis ilin. Pro tio li estis kondamnita al mortpuno. Antaŭ la morto Valenteno enamiĝis al filino de prizonisto. Ŝi estis blinda, sed okazis miraklo – la vidkapablo revenis. Forirante al la ekzekuto, li lasis al ŝi adiaŭan amleteron, subskribitan "Via Valenteno". Tio okazis la 14-an de februaro 268.

La programo komenciĝis ĵaŭde per unuhora lernado de novaj vortoj, prezentitaj de Dmitrij Semjonov. Ni lernis skribi gratulojn. Dimanĉe post nelonga instruado al novuloj kunvenis la plejparto de klubanoj. Ni verkis bondezirojn sur memfaritaj korformaj gratulkartoj, kiujn poste ni donacis unu al alia. Jelena Tubalec kaptis la okazon por diri kelkajn salutversojn al ĉiuj klubanoj.



teatraĵeto de Oljga kaj Dmitrij

Kompletigis la programon Oljga Sjabukova kaj Dmitrij Semjonov, kiuj montris teatraĵeton surbaze de teksto pri preparo de festa manĝado.

Ni daŭrigis nian verkadon. Post hajkoj kaj dekunuetoj, faritaj dum pasintaj studhoroj, ni provis krei versaĵetojn pri amo, uzante rimojn de Bill Thorne el la revuo "Komencanto" (№ 2, 1999). Tatjana Kuzjmina, Sergej Abramov, Jelena Tubalec bone faris tiun taskon.

Interesa estis ekspozicio de artaj bildkartoj de popola pentristo de Rusio, majstro pri akvareloj Sergej Andrijaka, kiujn donacis al ni Klara Ilutoviĉ. Sur plejparto de ili estis floroj, sen kiuj, laŭ komuna opinio, ne eblas amdeklaro. Lia akvarelo "Hejmaj kukoj" vekis apetiton, ĉar tempis manĝeti. Sed eĉ dum la teumado amo ne estis forgesita: bongustaj bakaĵoj havis formon de koretoj.

Certe sonis esperantlingvaj kantoj kun la ĉeftemo "Amo". La kvinhora kunsido finiĝis per informo pri someraj E-aranĝoj, kiujn ni esperas viziti.

Niaj belaj, niaj saĝaj, niaj gajaj, niaj plej, plej... Pri kiuj temas? Certe, pri knaboj kaj knabinoj, viroj kaj virinoj de nia Uljanovska klubo! Tiuj adjektivoj sonis precipe ofte en nia klubo la 22-an de februaro kaj la 15-an de marto. Post kutimaj studhoroj (la unua temo estis E-gramatiko kaj la dua – "Floroj") ni festis! Kaj ni havis multajn surprizojn!

Granda surprizo por niaj viroj estis la insignoj kun emblemo de la Uljanovska klubo, kiuj estis speciale faritaj por ili kiel donacoj okaze de la Tago de Defendantoj de la Patrujo. La dua surprizo estis "ĉastuŝkoj" pri niaj karaj klubanoj, kantitaj de la virina duono de la klubo. Ĉiuj knaboj kaj viroj estis menciitaj. Iliajn hobiojn



"ĉastuŝkoj" por viroj

la klubaninoj scias bone: Ivan parolas ĉine, Nikolao fiŝkaptadas ĉiusezone, Aleksandr ŝatas katojn, Dmitrij ŝatas paroli pri Esperanto, Sergej sportas, Jura interesiĝas pri barda kanto kaj vojaĝas volonte kaj multe, Dima bone dancas kun sia amikino... La tria surprizo estis granda bongusta torto, bakita de Lena Tubalec. Post la festado kelkaj esperantistoj vizitis koncerton de klasika muziko. Tio estis inda finalo de la festo. En la Granda Halo de Lenin-Memorialo sonis muziko de Ĉajkovskij.

La knaboj kaj viroj ne longe ŝuldis kaj ankaŭ surprizis siavice. Ili preparis mirindan aranĝon por la klubaninoj. Frukta ekzotika salato, kuirita de Jurij, Sergej, Ivan kaj Marat antaŭ la okuloj de la mirigita virina publiko, laŭ ĉies opinio iĝos la firmaa manĝaĵo de nia klubo.

Kiom bone la klubanoj konas siajn klubaninojn? Dum gaja konkurso okazis, ke inter 8 fotoj de niaj virinoj en infaneco nur Jurij divenis duonon de nomoj, kaj Sergej – 3. Do, niaj viroj ne estas atentaj. Sed ni ŝatas kaj respektas ilin tutegale.

Estas malfacile imagi nian klubon sen muziko. Ree ĝuigis la ĉeestantojn niaj geamikoj Irina Platonova kaj Vasilij Januŝevskij. Varme aplaŭdita estis virina trio (Irina Grebeŝĉenko, Tatjana Kuzjmina, Tatjana Jevina), kies debuto plezurigis la klubanojn. La romanco "Ŝal' de ĉeriza kolor'" (dankon al Klara Ilutoviĉ pro romanca kantaro!) sonis tre profesie. Tio ne estas mirinda, ĉar Tatjana Jevina estas profesia mizikisto. Rusaj, francaj, anglaj, esperantlingvaj kantoj sekvis unu post la alia. Dum komuna muzikumado ni lernis "Primaveran tangon", kies tekston ni ricevis dum EsPrimo-5. Ni decidis, ke tiu ĉi kanto plej bone respegulas nian humoron je tiu ĉi printempa tago. Komuna fotado kaj priparolado de programo por VER-14 en Samara kronis tiujn ĉi tagojn de surprizoj.

Margarita Karceva
(Uljanovsk)



komuna foto

EN RUSIO ONI VIVU LONGE...

Centjara jubileo de Boris Sokolov (1909 – 2002)

Se iome korekti ŝercan "raporton" de Boris Fjodoroviĉ (BF) Sokolov, verkitan antaŭ dek jaroj, ĝi sonus tiel:

"Studinte siatempe en certa amplekso fizikon, matematikon kaj mekanikon; strikte plenumante iliajn precizajn leĝojn... mi sukcesis tute senaverie 93-foje ĉirkaŭflugi la Sunon, kaj fari proksimume 34000 turnojn ĉirkaŭ la akso de l' Teroplanedo..."

Sokolov multon heredis de la patro – provinca telegrafisto, unu el pioniroj de E-movado en Suda Uralo, homo legema kaj muzikema. Tial Boris de la infanaĝo konatiĝis kun la latina alfabeto kaj la notsignoj. Kaj poste, jam en lernejo, Borĉjo Sokolov kvazaŭ sorĉita spektis la tajpilon de la direktoro: ĉi mistera maŝino faris sur papero jen rusan, jen latinan, jen grekan literojn.



rara foto el la jaro 1940, Sokolov staras meze

Kaj ĉi provinca urala lernejo mem estis granda donaco de Fortuno. Estro ĝia, Miĥail Sjuzjumov, kleriĝinta en Derpta universitato, estonte iĝis la plej eminenta sovetia kompetentulo pri la historio de Bizancio, profesoro de Urala universitato. Do, ne estas mirinde: juna pioniro Sokolov membris en taĉmento je la nomo de Lunaĉarskij – la plej klera homo en la unua sovetia registaro. Ankaŭ ne mirindas, ke multaj lernej-amikoj de BF iĝis inĝenieroj, sciencistoj, elstaraj industri-oganizantoj...

La fizik-teknika fakultato de Leningrada pedagogia instituto nome je Gercen. Adiaŭa flugo super Nevo-rivero per malgranda aeroplano (multe pli poste evidentiĝis, ke pilotis la fama Valerij Ĉkalov, punita per ĉi laboro pro ia rompo de la armea disciplino). Oficsendo por laboro en la ĵus fondita Instituton por meĥanizo de agrikulturo – la unuan superan lernejon de la urala urbo Ĉeljabinsk. Kaj sesdekjara laboro tie – de lektoro en laborista fakultato ĝis fondinto kaj profesoro de la katedro "Rezisto de materialoj". Jam emeritiĝinte, BF jen kreis albumon pri historio de la katedro, jen alian albumon kolektis – pri internaciaj kontaktoj de sia instituto (nun universitato). Hodiaŭ en la universitato funkcias fako de internaciaj rilatoj, sed iam ĉi kontaktojn ĉefe Sokolov mem organizis. Ĝis nun en laboratorioj de la katedro konserviĝis desegnoj, standoj, modeloj, diapozitivoj, albumoj, kontrol-instruaj aparatoj, kiujn faris BF...

Satiraj poemoj, madrigaloj, parodioj – ĉion ĉi Sokolov dum la tuta vivo verkis, estis ĉiama aŭtoro kaj kunaŭtoro de humuraj amatoraj spektakloj, murgazetoj, filmoj... Li ne tro alte pritaksis proprajn poeziajn eksperimentojn, sed mi legis kaj aŭdis de li mem versaĵojn profundajn, plenajn de fortaj sentoj. Unu inter ili, noble kolera, finiĝis per vere flamaj linioj... Temis pri Fizik-teknika Instituto je la nomo de Ioffe, antaŭ kies fasado staras tri monumentoj. Sub la piedoj de Igorj Kurĉatov kaj Pjotr Kapica estis ĉizite: "rusa sciencisto", sed sur la piedestalo de Abram Ioffe – "akademiano". Sokolov, indignita de jena burokratia ŝovinismo, versis:

... Titoli "rusa sciencisto"
Hebreon saĝan 'is danĝer':
El listo de estrar-konsisto
Ja eblus fali en mizer'...

Jen staras inter du gigantoj
La egalulo, ne pari' –
Sengenta ĉi kunbatalanto,
Genia filo de l' Patri'.

La citita versaĵ-fragmento multon diras pri Sokolov mem, pri liaj starpunktoj. Li longtempe misopiniis pri dekomenca humaneco de Sovetio, tamen ĉia konkreta akto de administracia idiotismo vekis en lia animo rezistan reagon. Antaŭ 30 jaroj mi ĝojis: jen fondiĝis Asocio de sovetiaj esperantistoj! Sed BF min kvazaŭ per malvarma akvo surverŝis: "Jeno estis farita nur por nin kontroli"...

Ne tro naiva estis la maljuna entuziasmulo. Sed neniam li evitis aferojn, kiuj povus utili por klerigado, kulturo, progreso. Li prelegis en lernejoj, kolĥozoj; partoprenis en unika instituta teatro; instruis studentojn filmi... Li kompilis "Praktikan teknik-minimumon por komencanta kinoamatoro (demandoj kaj respondoj)". En ĉi kateĥismo demandoj rilatis ne nur al ekspono aŭ muntado; jen unu: kion signifas "etiko de filmado"? Tre aktuale sonas!

Sed la plej grava hobio de Sokolov restis Esperanto. Preskaŭ ĉiuj nunaj esperantistoj en Ĉeljabinsk estas liaj lernintoj aŭ lernintoj de liaj lernintoj. Li ĉiam, denaske sciis pri Lingvo Internacia, ricevis lernolibrojn de sia patro, sed ĉiuj ni informiĝis pri Esperanto hazarde: ie aŭdis, ie legis...

Tiel okazis: duonvive BF estis esperantisto-solulo – ne korespondis, ne klubaniĝis. Nenion li sciis pri la pereo de SEU-gvidantoj en 1938, sed sentis: amata lia Lingvo Internacia ne taŭgas por la lando, kie venkis proleta internaciismo. Des pli ĝoje por li estis aŭskulti raportaĵon pri la esperantista renkonto dum Moskva junulara festivalo: unuafoje post 20-jara silento Moskva Radio parolis pri Esperanto.

De tiu momento Sokolov iĝis senlaca E-propagandisto. Li organizis en sia instituto la klubon "Amika manpremo", kiu havis korespondantojn el multaj landoj. Jurij Gagarin persone gvidis voĉdonadon pri membrigo de ĉi klubo en Societo de sovetia-kuba amikeco. Nun ni scias valoron de tiuj oficiale permesitaj "amikecoj", sed ekzistis ja simpla homa amikeco! Tiam BF eĉ la hispanan lernis, dum multaj jaroj uzis ĝin por leterumi...

Nur dum "perestrojko" ekmodis la vortumo "popola diplomatio", sed Sokolov ĝin praktikis jam antaŭ 50 jaroj. La sloganon "Pli bone esti pacaktiva hodiaŭ ol ra-

dioaktiva morgaŭ!” li disvastigis per centoj memfaritaj fotobildkartoj. Verŝajne li ĉiam estis preta al gravaj ŝanĝoj en nia lando – ja li mem helpis, por ke ĉi tempo venu.

Inda estis vivo lia. Li edukis milojn da studentoj, multaj el ili iĝis sciencistoj, helpis transformi sian instituton en universitaton. Sed kiom da “neoficialaj” lernintoj (legantoj jam komprenis, ke la aŭtoro estas unu el ili), kiom da amikoj tra la tuta mondo!

Vivofine Sokolov serioze malsanis, legi povis nur per unu okulo helpe de lupeo... Tamen li konstante legis, aŭskultis radion, vigle interesiĝis pri novaĵoj en Esperantujo. Nialandaj novaĵoj ne ĝojigis... Tamen BF, difirence de multaj samaĝuloj, ne idealigis hieraŭon. En la pasinto li ŝatis nur tion, pro kio ne eblas honti antaŭ la estonto.

Vjaĉeslav Roĵdestvenskij (Ĉeljabinsk)

(la plena teksto de ĉi rakonto aperis en “Scienco kaj Kulturo”, № 1 (89), 2009)

RUSAJ ESPERANTISTOJ EN AŬSTRALIO

Antaŭnelonge mi hazarde trovis en la reto rakonton de rusa esperantisto Adrian Toporov, kiu komence de la dudeka jarcento alvenis en malgrandan altajan vilaĝon por instrui infanojn en la loka lernejo. Tiam li ankoraŭ ne estis esperantisto.

Unue, kiam li ĵus aperis en la vilaĝo, li estis tre surprizita de verdaj steloj sur la bariloj kaj surskriboj: “Vivu Esperanto!” Lokaj kamparanoj klarigis al Adrian, ke tion faris ilia pastro Innokentij Nikolajeviĉ Serîŝev (1883-1976). Laŭ tiamaj leĝoj pastro nepre devis instrui “La leĝon de Dio” en lernejo. Kiam la pastro aperis en la lernejo, Adrian Toporov demandis lin, kion signifas la verdaj steloj, kaj post ricevo de respondo ekinteresiĝis pri Esperanto. I.N.Seriŝev ne similis ordinarajn pastrojn. Li finis realan lernejon, poste Tomskan politeknikan instituton, sciis 5-6 lingvojn, pianludis, povis kanti, pentris. En lia loĝejo troviĝis multe da kolektoj – arkeologia, botanika, entomologia, minerala – kaj tre riĉa biblioteko.



katedralo en Sidnejo, en kiu diservis Seriŝev

Tiam, kiam Adrian Toporov ekkonis I.N.Seriŝev, ambaŭ estis sufiĉe junaj homoj. Seriŝev estis 33-jara. Li havis grizajn okulojn kaj saĝan vizaĝon. Ankaŭ lia edzino ne estis ordinara. Ŝi ne similis la kutimajn dikajn pastrinojn. Ili

amis unu la alian. En ilia domo oni povis aŭdi ĝojajn voĉojn: “Keŝa!.. Katjuŝa!..” kaj altatonan ridon. Bedaŭrinde, ili ne havis infanojn.

Adrian Toporov ofte vizitis la loĝejon de Seriŝev, kiu finfine fariĝis lia Esperanto-instruisto. Post la Oktobra revolucio Seriŝev demetis la pastroveston kaj komencis funkcii kiel sekretario de Altaja kultur-klerigada unio. Grandan parton de sia biblioteko Seriŝev donacis al la vilaĝa lernejo. Krome, Seriŝev estis verkisto. Per siaj libroj kaj artikoloj li volis helpi al homoj trovi sian vojon en la vivo. Altaja kultur-klerigada unio eldonadis multe da interesaj kaj gravaj revuoj, artikoloj, libroj. Dum la dudekaj jaroj en iu maltaŭga momento Serisev veturis en Japanion pro la aferoj de eldonejo – por aĉeto de papero, sed ne revenis. Li forveturis sola, sen la edzino, ĉar ne planis resti en Japanio. Tamen Civitana milito malhelpis lin. Sen li en la vilaĝa lernejo, kie li antaŭe instruis kaj al kiu li donacis siajn librojn, foje ekflamis incendio. Multe da libroj forbrulis. Kaj multe da libroj, kiuj ne brulis, estis disprenitaj de lokaj kamparanoj por prepari memfaritajn cigaredojn. Adrian Toporov ne povis elteni tion. Li kun helpantoj kolektis malnovajn gazetojn kaj poste vizitis kamparanojn en iliaj loĝejoj, petante ilin ŝanĝi librojn kontraŭ la gazetoj.


Dianne Lukes kaj Tim Wade-Ferrell

Adrian Toporov daŭre loĝis en la altaja vilaĝo kaj same instruis Esperanton. Ekzemple, ankaŭ Stepan Titov, la patro de la dua sovetia kosmonaŭto German Titov, loĝis en tiu vilaĝo kaj estis lernanto de Adrian Toporov. Stepan Titov ankaŭ estis interesa homo. Li laboris en la altaja vilaĝo kiel instruisto kaj havis abundan korespondadon kun esperantistoj el diversaj landoj. Lia filo German Titov rememoris, ke la patro korespondis kun germana tajlorino, japana kamparano, aŭstralia instruisto. Stepan Titov eĉ ĉefis la sovetian delegitaron dum la 49-a Universala Kongreso en Hago en 1964. Post la flugo de G.Titov Adrian Toporov subite ricevis leteron en Esperanto el la malproksima Aŭstralio – de Seriŝev. Evidentiĝis, ke Seriŝev estis viva! Ĝis la morto en 1976 Seriŝev loĝis en Aŭstralio kaj fariĝis pastro en Sidnejo. Lia pastrino Katjuŝa loĝis kun li. En Aŭstralio li daŭris religi-klerigan agadon. Nun la arkivo de Seriŝev konserviĝas en la Muzeo de rusa kulturo en San-Francisko. En Rusa instituto de Kolumbia universitato estas konservata 5-voluma aŭtobiografio de Seriŝev.

Multe da Seriŝev-verkaĵoj troviĝas en Rusia Ŝtata Biblioteko (eksa Lenin-biblioteko).

Venas la demando: Kial la artikolo titoliĝas “Rusaj esperantistoj en Aŭstralio”? Ja en la artikolo oni rakontas nur pri sola rusa esperantisto I.N.Seriŝev?

Januare 2009 Aŭstralia Esperanta Asocio (AEA) organizis en Sidnejo la Somerkursaron (en Aŭstralio nun estas somero!). Ni, grupo de rusaj esperantistoj el Sankt-Peterburga Esperanta klubo “Espero” (fondita en 1892!) kaj tri personoj el Moskvo, kun nia prezidantino Anna Butkeviĉ laŭ invito de AEA vizitis Aŭstralion kaj partoprenis la Somerkursaron. Mi estas tre danka al Dianne Lukes, Rainer Kurtz, Tim Wade-Ferrell, Igor Couto kaj aliaj pro la bonege organizitaj lernado kaj ripozo, multe da tre interesaj ekskursoj. Aparte mi volas danki Igor Couto pro lia helpo en serĉado de la rusa ortodoksa preĝejo en Sidnejo, kie diservis I.N.Seriŝev.

Entute mi povis viziti du rusajn ortodoksajn preĝejojn en Sidnejo:

– Sankt-Vladimiran preĝejon, kie mi parolis kun la pastro Daniil Metlenko, kiu multe faris por konstruado de la preĝejo; nun preskaŭ cento da homoj venadas al tiu preĝejo por ricevi animan subtenon, kvankam antaŭ kelkaj jaroj – nur ĉirkaŭ 20;

– Sankt-Petro-Paŭlan katedralon en Strathfield (ankaŭ Sidnejo), en kiu, reale, antaŭ multe da jaroj diservis I.N.Seriŝev.



dum la ekskurso en Bluaj montoj

Nun aŭstralianoj memoras pri li, konservas lian arkivon. En tiu preĝejo mi ekkonis rusan virinon Natalia Borisovna, kiu multe faris por konservado de rusa lingvo en Aŭstralio. Ŝi mem jam dum 50 jaroj loĝas en Aŭstralio, kien ŝi alvenis el Harbino. La plej granda ŝia zorgo (kaj de ŝiaj geamikoj) estas subteni ĉiel rusajn homojn en Aŭstralio por ilia konatiĝo kun rusa lingvo kaj rusa kulturo. Por tiu nobla afero ŝi tre bezonas rusajn librojn por infanoj kaj plenaĝuloj.

Bedaŭrinde, mi ne havis sufiĉe da tempon en Aŭstralio por viziti la tombon de I.N.Seriŝev en Sidnejo. Eble, dum sekva vizito, se ĝi okazos, mi finfaros ĉion, kion mi ne sukcesis ĉi-foje.

Jekaterina Maliŝeva (Sankt-Peterburg)

(dankon al V.P.Cvetkova pro granda helpo pri preparo de la artikolo)

TESTO PLI PLURALISMO

En la ĵus ricevita unua numero de REGo mian atenton altiris la artikolo sub la titolo “Kial mi ne povas kabei?” Laŭ la stilo kaj tono oni povus retitoli ĝin “Ploro de la princino Jaroslavna”. La iam fame konatan aŭtoron de la artikolo, certe, oni povas sincere, samideane kompati kaj eĉ sin zorgigi pri la eternaj rusiaj demandoj:

kion fari kaj kiu kulpas? Al la unua damnita demando ankoraŭ ne respondis iu ajn rusia menspotenculo. Pri la dua demando respondo tujas: kulpulojn oni serĉu en la hejmaj speguloj. Jes ja, necesas nurnure proksimiĝi al la spegulo, fiksrigardi iomete kaj jen! – la respeguliĝo tuj rivelas la kulpulon, ĝuste kaj senerare.

Krome: la aŭtoro mencias tre teruran personon, nome la ĉefon da la siberia religia komunumo Vissarion. Estas sekreto por neniu ke temas pri la tipa detruiva sekto simile al tiu de David Koresh aŭ Asahara. La amaskomunikiloj abundas pri avertoj de diversaj fakuloj – psikologoj, psikiatroj, personoj-viktimoj de la menciata sekto. Oni mencias rompitajn sortojn, ruinigitajn sanojn, forprenitajn vivojn de tiuj, kiuj iam partoprenis agadon en la paradizo de la eks-milicano Anatolij Torop-Vissarion. Vane la aŭtoro altiras je oreloj la komparon, ke en la komunumo regas etoso kiel en iamaj SEJT-oj... La juna popolo de nialanda Esperantio estas ege kredema kaj avida pri varmanimaj logiloj. Kiu scias, eble troviĝos multaj el ili, kiuj ekdeziros la reklamatan ekzotikon kaj impetos al Vissarion. Do, kara sinjoro Gonĉarov, ne alvoku gejunulojn iri en Siberion! Pli bonos se vi efektivigos viajn planojn publikigi ĉe viaj E-amikoj Volodja Samodaj kaj Gena Ŝilo vian riĉegan materialon pri esperantologio. Bonsorton al vi.

Jevgenij Kononenko (Toljatti)

NACIA FRAZEOLOGIO E-VESTE

La unua ideo publikigi mian kolekton da ĉelegaj elnotoj en la revuo "Scienco kaj Kulturo" (SkK) trovis baron de amplekso. Bezonatos pluraj jaroj por ĉion publikigi. Tial mi decidis, kun jeso de SkK-redaktoro, meti la frazeologian parton de la elnotoj al alia rusia revuo, kiun vi tenas nun en la manoj.

La beletroesprimiva parto de e-lingvo konstante riĉiĝas ĉefe el du fontoj: nacilingvaj gramatikoj kaj nacia pensado. Necesas aldoni, ke ekzemple la rusan ĉirilatan influon mi ne nepre povis dumlege rimarki, do rimarkis precipe alilingvajn influojn – ne nur al esperanto, sed ankaŭ al mia propra e-lingva pensado, pliriĉiĝanta kun ĉiu nova e-legaĵo. Resume, la gramatikan influon vi legos en SkK kaj la nacimensan influon – en REGo.

La landoj de fontoj sekvos en alfabeta ordo, do en ĉi-peca kontribuo vi konatiĝos kun la angla, araba kaj belga pensmanieroj novismaj por la rusaj (minimume miaj) oreloj. La mallongigoj: or. – originale verkita, tr. – traduko.

A N G L I O

"Inferaĉa stato", diras Larsen. "Ĉiuj atendas nin". "**Ne konstipiĝu**", diras Smith. "La sola afero zorginda por homo en tiu ĉi mondo: ĉu li iros en Paradizon, aŭ ĉu li iros en Inferon".
K.Jakobo (tr.), La Gazeto, 35 (jul. 1991), p. 15

Do, denuncu, ĝis vi krevos; mi **fajfas je tio**.
C.Rossetti (or.), Kredu min sinjorino, eld. "Heroldo de Esperanto", 1949-50, p. 105

Jes, mi ja edziĝis. Mi estis juna tiam – nura **flavbekulo**.
C.Rossetti (or.), Kredu min sinjorino, eld. "Heroldo de Esperanto", 1949-50, p. 97

Fraŭlino Kotman estis okupita, mi iom persistis; ŝi nervoziĝis kaj diris, ne vere kolere, sed nur kun ia milda kaj preskaŭ bonhumora malpacienco: “Ho, Nesbit, **iru en la flamojn**!”.
M.Boulton (or.), 25 Jaroj, HEA, Budapest, 1977, p. 114

Poste ni dum eble kvin minutoj – kvankam ŝajnis pli longe – sidadis kaj fiksrigardadis unu la alian en **densa silento**.
M.Boulton (or.), Okuloj, eld. “Stafeto” La Laguna, 1962, p. 60

La reĝo silentis longe kaj terure. Lia tuta animo falis en **vastan puton de silento** kaj dum longa tempo ne trovis la fundon.
M.Boulton (or.), Norda Prismo, 1, 1958, p. 25

Sed kiam fraŭlino Kotman eniris iun klasĉambron, **estiĝis silento tiel profunda, ke oni preskaŭ povus palpi ĝin**.
M.Boulton (or.), Okuloj, eld. “Stafeto” La Laguna, 1962, p. 59

Ĉu vi iam vidis “La Venĝon de Ruĝa Godfrey” mi demandis al Finn... “**Ĉu via cerbujo fendiĝis**?” diris Finn.
M.Boulton (tr.), Norda Prismo, 4, 1963, p. 102

Ili penis, ĝentile laŭ sia opinio, sugesti, ke tia nedankemo ne konvenas. Sed la ranĉistoj **sin fortiris en vitrecan silenton**. Malespere la oficistoj fuĝis per siaj luitaj radaloj.
K.Jakobo (tr.), La Gazeto, 33, (mar. 1991), p. 26

Ni dediĉis nian atenton al ludo kaj ĉar kvar knabinoj estis senditaj en korton, ĉambro iĝis **silenta kiel sonĝo**.
G.Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb (tr.) en Mary Webb, Malbeno kara, 1994, Beverley, Aŭstralio, p. 40

Ĉambro estis **tiel kvieta ke oni povus aŭdi akveron guti de la tegmento**.
G.Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb (tr.) en Mary Webb, Malbeno kara, 1994, Beverley, Aŭstralio

Do ni restis en **profunda kazeiĝinta silento** kiu pli kaj pli fariĝis solida kiel glaciiĝinta akvo aŭ acidiĝanta lakto.
G.Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb (tr.) en Mary Webb, Malbeno kara, 1994, Beverley, Aŭstralio, p. 105

Ni forturnis nin de fermita enirej’ **silentaj kiel ŝtonoj**.
G.Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb (tr.) en Mary Webb, Malbeno kara, 1994, Beverley, Aŭstralio, p. 29

Ili iris returne. Venis Arago, Guido, Vigné, ĉiuj, ĉu ne, **honestaj kiel la tago**.
R.Rossetti (tr.), Norda Prismo, 1957, 3, p. 131

La frenezo **turnas la homon interno-eksteren, kiel sakon**, diris Arago.
R.Rossetti (tr.), Norda Prismo, 1957, 3, p. 132

Evelino ne **ploris multajn larmojn** pro forlaso de la butiko.
R.Williams (tr.), La Ondo de Esperanto, 2008, 6, p. 23

A R A B I O

Sekvas citaĵoj el sola fonto: ***Ĝ.Ĥalil Ĝibran, La rompitaj flugiloj****, Kultura kooperativo de esperantistoj, Brazilo (el la araba tr. G.Abraham). Post tralegi tiun maldikan libreton mi komprenis ke e-lingvaĵo multon gajnos kiam en arabaj landoj disvastiĝos nia lingvo.*

La aspekto de montoj, arboj kaj riveroj aliiĝas je la ŝanĝo de statoj kaj epokoj, kiel ŝanĝiĝas la homa mieno pro ties pensoj kaj emocioj. Poplo, kiu dumtage alteniĝas kiel bela fianĉino per kies vestojupoj petolas la zefiro, vespere ŝajnas fuma kolono... [p. 66]

Je noktomezo la soleneco de la silento pliiĝis, kaj krescenta luno eliris el malantaŭ monto Sannin kaj montriĝis inter la steloj, kvazaŭ kadavra vizaĝo en ĉerko ĉirkaŭita de malfortlumaj kandeloj. Tiam Libano ŝajnis maljunulo, kies dorson kurbigis la jaroj. [p. 66]

Ho Dio! Kion faris la virino, ke ŝi meritas vian koleron? Kian kulpon ŝi havas, ke via malkontento poreterne ŝin sekvas? Ĉu ŝia krimo estas tiel granda, ke via punado estas senfina? Ho Dio! Vi estas forta kaj mi estas febla; kial vi tiel suferigas min? [p. 61]

... Ne romanon vi trovos tie ĉi, sed la efektivan realaĵon de simplaj personoj, kiuj sukcesas flori ĉe la marĉo kaj malgraŭ ĝiaj brakumantaj intencoj. [p.13]

... kiel se ŝi scias, ke la beleco havas apoteozan lingvon alteniĝantan super la voĉojn de langoj kaj lipoj. Ĝi estas senmorta lingvo altiranta al si ĉiujn tonojn de la homaro kaj faras ilin senvoĉa sentimento, kiel serena lago altiras kantojn de riveretoj. [p. 32]

Ĉu ne ĉiuj altaj neatingeblaj vinberaj grapoloj estas acidaj, laŭ opinio de vulpoj? [p. 53]

Do, malsatulo en dezerto ne rifuzas manĝi malfreŝan panon, se el la ĉielo ne pluvas manao kaj koturnoj. [p. 36]

En la valo de la morto mi starigos statuon pri la Amo kaj adoros ĝin. Amo estos mia nura konfidencanto kaj mi aŭskultos nur ĝian kanton; mi trinkos amon kiel vinon kaj portos ĝin kvazaŭ veston. [p. 62]

... kaj junulo sonĝanta kaj ĉagrenanta, kiu ankoraŭ ne gustumis la likvoron de la vivo nek ĝian vinagron. [p. 42]

La amo estas sola libero en la mondo ĉar ĝi tiel levas la animon, ke la leĝoj de la homoj kaj la fenomenoj de la naturo ne atingas nek regas ĝin. [p. 93]

La glasoj ne logas niajn lipojn, se la koloro de la vino ne vidiĝas tra la kristalo. [p. 53]

La homoj timas kaj obeas lin kaj adore kliniĝas antaŭ li, kiel kliniĝas la koloj de la ŝafidoj antaŭ la buĉisto. [p. 26]

La junuloj havas flugilojn el poezio kaj nervojn el fantazio, per kiuj ili leviĝas trans la nuboj, vidas la naturon saturita je lumradioj kun la koloroj de la ĉielarko, aŭdas

la vivon kantanta pri gloreco kaj grandiozeco. [p. 30]

Li strangamaniere kaj longe rigardis en miajn okulojn – rigardon de amo kaj timo, rigardon de profeto antaŭvidanta la enkaŝitaĵojn de la animo. [p. 27]

Mi amas vin, Salma, kiel kampoj amadas sian printempon, kaj mi vivas en vi kiel vivas la floroj en la varmo de la suno. [p. 61]

Mi eliris el la domo, kaj la maljunulo akompanis min ĝis la ĝardena heĝo; tiam mi adiaŭis dum mia koro tremadis kiel la lipoj de soifanto tuŝantaj la randon de la glaso. [p. 33]

Mi volis paroli, sed miaj lango kaj lipoj paraliziĝis; tiel mi turnis min al la silento, la nura lingvaĵo de la koro. [p. 40]

Oni diras ke la malscio faras la homon senzorga, kaj la senzorgeco okazigas oportunecon. [p. 20]

Tiam ŝi rerigardis min, kiel se ŝi bedaŭris kion si diris, kaj provis repreni sian diron el miaj oreloj per magieco de siaj okuloj. [p. 43]

Tiel la aspektoj de la aferoj ŝanĝiĝis laŭ niaj emocioj, kaj tial ni imagis ilin ĉarmaj kaj belaj, kiam la ĉarmo kaj belo troviĝas en ni mem. [p. 45]

Kelkaj minutoj pasis kaj ni ambaŭ restis silentaj, ĉiu atendanta la ekparolon de la alia. Sed ĉu nur parolo estigas la interkomprenon inter du animoj amantaj unu la alian? Ĉu nur la voĉoj kaj silaboj elvenantaj el lipoj kaj langoj alproksimigas la korojn? [p. 42]

Ĉiu grandiozeco kaj beleco en ĉi tiu mondo kreiĝas el sola penso aŭ emocio interne de la homo. Ĉio kion ni vidas hodiaŭ farita de la pasintaj generacioj estis, antaŭ sia apero, penso en la menso de viro aŭ sentimento en la koro de virino… Nur unu penso. [p. 43]

En Sirio neniu kristano povas kontraŭstari episkopon kaj resti konsiderita kredanto. Kiu viro en Oriento malobeas sian religiestron kaj havas plue sian bonan reputacion? Ĉu okulo, sen trapikiĝo, povas rezisti kontraŭ sago? Ĉu nuda mano povas, ne fortranĉita... [p. 53]

Poste li delikate metis siajn fingrojn sur ŝian korpon, kaj li trovis ĝin silenta kiel la jarcentoj
G.Abraham (tr.) Fonto, 43, (apr. 1984), p. 21

B E L G I O

Fakto estas, ke niaj ministroj kaj ĉe la kapo la reĝa moŝto Albert-2, kompreneble ne forgesis la ĉefepiskopon Godfried Danieels **blovi varme kaj malvarme antaŭ la okuloj de la televidkameraoj**... (*ne scii kion diri en embaraso; provi elturniĝi)*
Schram (or.), Sennaciulo, 1997, 1, p. 3

Mi, tamen plenplena de impresoj, ne verkis ion, sed montris miajn multajn lumbildojn ĉe pluraj E-grupoj... "Tion, kio la koron plenigas, la buŝo elverŝigas".
W.Raymond (or.), El Popola Ĉinio, 2000, 11, p. 10

(d a ŭ r i g o t a)

Bulteno de REU

RAPORT-REELEKTA KONFERENCO DE REU

Ĉiuj membroj de REU estas invitataj partopreni en la raport-reelekta Konfrenco de la Unio, kiu okazos sabate-dimanĉe la 16-17-an de majo 2009 en Moskvo. La ejojn por la aranĝo afable disponigas Eŭropa Jura Universitato "Justo".

La Konferenco devos diskuti pri la kuranta situacio en REU, aŭskulti kaj pritaksi la raportojn de la nuna Estraro kaj de la Kontrol-revizia Komisiono, elekti la novan Estraron kaj KRK kaj akcepti rekomendojn pri la plua agado.

Krom la konferencaj kunsidoj oni antaŭvidas kulturajn aranĝojn. Okazos prezentadoj de novaj E-libroj, renkontiĝoj kun la redakcioj de rusiaj E-gazetoj ks. Pliaj informoj sekvos.

La loĝado en Moskvo estas TRE multekosta, tial por la partoprenontoj NE ESTOS proponata ia kuna loĝigo. Oni devas mem interkonsenti kun siaj moskvaj parencoj, amikoj aŭ eĉ kun hoteloj pri la tranoktado. Oni povas ankaŭ peti asiston de la gvidantoj de moskvaj E-kluboj, por ke ili helpu trovi la gastiganton inter siaj membroj. Se oni ne scias, kiel tion fari, oni povas sin turni al REU por informa helpo.

La manĝado estos same memzorga. En "Justo" ekzistas malgranda bufedo, kie dum la Konferenco estos moderpreze aĉeteblaj diversaj manĝoj kaj trinkaĵoj. Ĉiam senpage estos disponebla boligita akvo. Proksime de la universitato troviĝas kelkaj nutraĵvendejoj – kun pli-malpli averaĝaj rusiaj prezoj. Kaj, kompreneble, en la urbo estas miloj da kafejoj, restoracioj kaj manĝejoj – kaj moskvaj e-istoj povos konsili pri ilia trovado. Se troviĝos aliaj variantoj, informoj pri tio aperos en pluaj anoncoj.

Aliĝkotizo. Por kovri teknikajn elspezojn surloke estos kolektata aliĝkotizo:

a) junaj REU-membroj – 200 rub.

b) pli aĝaj REU-membroj – 300 rub.

c) nemembroj – 400 rub.

REU-membroj el urboj je distanco pli ol 1000 km de Moskvo aliĝas senpage.

Kontakta retadreso: <konferenco@reu.ru>.

PREZIDANTA RAPORTO

pri la agado de REU en 2007 – 2009

La raporto rilatas al la periodo marto 2007 (kiam okazis la antaŭaj reelektoj) – aprilo 2009 (kiam estas verkata la raporto).

Ĝenerala pritakso: malaktiviĝo

La ĉefa agado en tiuj du jaroj estis la laboro pri invitado de Universala Kongreso de Esperanto al Moskvo por la jaro 2009 aŭ 2010.

La unuaj grandaj sukcesoj por tiu agado estis faritaj vintre 2006-2007, kaj finiĝis la kampanjo per plena malsukceso somere 2008.

Entute la agado dum la periodo estis konstante malaktiviĝanta – kun relative grandaj sukcesoj komence (kiel sekvo de multe pli aktiva agado en 2005-2006) kaj ege malmultaj atingoj en 2008 – komenco 2009.



Aranĝoj

Tradicie por REU kaj REJM la ĉefaj komunaj tutlandaj agadoj estas aranĝoj. En la raportata periodo la aranĝoj unuflanke kulminis per unu el la plej sukcesaj RET-oj en la historio de la aranĝo, aliflanke profunde krizis, kio respeguliĝis en malfortaj EoLA-j kaj neokazinta OkSEJT.

Okazintaj aranĝoj:

REK/EoLA en marto 2007, Tiĥvin

RET en aŭgusto 2007, Primorsko-Aĥtarsk

EoLA en februaro 2008, Ĉeboksary

IET-1 en julio 2008, Krimeo, Ukrainio

Ve, en 2009 nek RET, nek EoLA estas planataj. REK – same, anstataŭ ĝi okazos la reelekta Konferenco.

Ne eblas klarigi tion per ia sistema krizo, ĉar sistemaj krizoj evoluas dum jaroj kaj ĉi-kaze la ŝanĝo estis subita. Prefere ni klarigu tion per la homa faktoro – i.a. malsukcesa agado de la prezidanto.

Membraro

REU daŭre havas belan statistikon: ĉiujare la membrokvanto kreskas. Ekz. en 2007 la membrokvanto unuafoje superis 400 kaj atingis 404 personojn kaj en 2008 oni jam kalkulis 406 membrojn. Indas atentigi, ke la kvanto de individuaj membroj iom malkreskis – de 118 (en 2007) al 108 (en 2008) personoj.

Financoj

2007 kaj 2008 estas finance kontraŭaj jaroj. En 2007 REU krom membrokotizoj ricevis grandajn enspezojn pro antaŭaj aktivaj agadoj, pro bone preparitaj (ankoraŭ en 2006) aranĝoj – REK/EoLA kaj RET-07.

Entute enspezite en 2007: 79459,97 rub.
Entute elspezite en 2007: 41818,11 rub.
Proficito en 2007: 37641,86 rub.

En 2007 REU ĉefe koncentriĝis pri invitado de UK al Rusio. Kiel invitanto, REU pagis por la vizito de la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller en majo 2008. Li konatiĝis kun proponataj kongresejoj kaj renkontiĝis kun oficialuloj en la registaro de Moskvo. La elspezoj estus eĉ pli grandaj, se parton de ili ne transprenus Eŭropa Jura Universitato "Justo". Kaj la enspezojn plenigis preskaŭ nur la membrokotizoj.

Entute enspezite en 2008: 29196,1 rub.
Entute elspezite en 2008: 42417,36 rub.
Deficito en 2008: 13221,26 rub.

La deficito reale devus esti iom malpli granda, tamen pro teknikaj miskialoj la REU-parto de la profito de IET-1 en Krimeo (100 dolaroj) trafis al la bilanco de 2009.

La sumo en la kaso de REU por la 31-a de decembro 2008: **65 568,59 rub.**

La monda financa krizo preskaŭ ne influis la ŝparaĵojn de REU, krom la fondaĵo "La dua Jarcento de Esperanto", kies aktivoj en 2007 estis konvertitaj el tiam senvaloriĝantaj dolaroj al akcioj de prestiĝa investa agentejo. La restinta valoro (ĉ. 2 mil rub.) egalas al la sesono de la antaŭa valoro (ĉ. 12 mil rub). Tamen, konsiderante, ke la celo de la fondaĵo estas ŝpari sufiĉan monsumon por akiri propran sidejon por REU, ni ne tro malproksimiĝis de la celo, ĉar ĉiukaze temus pri multoble pli granda sumo.

"Homa Faktoro"

Ĉiuj sukcesoj dum la raportata periodo okazis dank' al homoj kaj same estis pri la malsukcesoj.

Inter la sukcesoj mi notus fidindan kaj akuratan agadon de REU-kasisto Mikaelo Ĉertilov kaj iniciatojn de Jurij Karcev, kiu okazigis du "kalendaretajn kampanjojn".

Plej videbla daŭre estis la agado, kiun nome de REU plenumis Garik Kokolija – temas kompreneble pri aperigo de "REU-bultenoj" en la eldonata de li movada gazeto REGo, kvankam multaj kredas, ke la tuta REGo estas REU-agado.

Laŭ iniciato de Grigorij Arosev kaj Nikolao Gudskov REU efektivigis projekton de kompilo kaj eldono de antologio de prozaj verkoj far nuntempaj esperantistoj el Rusio. La libron, aperintan en 2008, kaj ricevintan titolon "El ombro", eldonis la eldonejo "Impeto". Ĝi ricevis sufiĉan agnoskon de legantoj, pri kio atestas la fakto, ke ĝi eniris la liston de 10 libroj, pretendantaj la titolon "Libro de la jaro" ĉe "Literatura Foiro".

Multon faris, nome de REU aŭ menciante REU, ankaŭ Mikaelo Bronŝtejn, Slavik Ivanov, Vladimir Bespalov, Irina Gonĉarova kaj kelkaj aliaj.

Malsukcesoj, nature, ankaŭ okazis pro homoj. La ĉefa kialo de tiuj estis malaktiviĝo de mi, kiel la prezidanto. Mallonge, jam antaŭ la reelekto mi ricevis kronikan malsanon, kiu forprenis de mi amason da fortoj kaj sekve da entuziasmo kaj

laborpreteco. Malgraŭ tio mi bedaŭrinde en marto 2007 konsentis reelektiĝi kiel REU-Prezidanto pro la rapide progresanta projekto pri invitado de UK al Rusio – kiun mi mem longe propagandis. Poste mi kelkfoje provis demisii, sed, antaŭvidante problemojn pri kandidatoj, la Estraro ne konsentis pri la demisio kaj antaŭtempaj reelektoj. Sekve mi rolis kiel "simbola prezidanto" – reale ne aktiva, sed formale respondeca.

Kompreneble, mi neniukaze konsentos reelektiĝi por la prezidanta aŭ estrara posteno dum la ĉi-maja Konferenco. Se mi iom po iom reaktiviĝos (ekzistas certaj signoj pri resaniĝo), mi aktivos sen postenoj.

Al la Konferenco estus rekomendinde nepre NE elekti plian "simbolan prezidanton" – la malaktivado jam estis tro longa. Ankaŭ oni prefere ne elektu "honorajn estraranojn" – altestimatajn personojn, kiuj konsentas elektiĝi, sed ne intencas ion ajn fari sur la landa nivelo, ĉar preferas kaj ŝatas agi loknivele aŭ nur individue.

En la movado ekzistas, kvankam ili estas tre malmultaj, tiuj homoj, kiuj kapablas fari ion utilan por la tuta landa movado. Sufiĉus eĉ tri-kvar tiaj personoj, por ke REU fartu bone kaj progresu.

Andrej Grigorjevskij, Prezidanto de REU

MALFERMA LETERO AL REU-KONFERENCO

Antaŭ ol legi la tekston mi proponas por la personoj, kiuj en la studentaj jaroj ne lernis la teorion pri sistemoj, peti ĉe mi <anatolog@mail.ru> la tekston de sciencpopulara e-lingva artikolo pri la sistemevoluo por atente konatiĝi kun ĝi. Per tio ni poiomete transiru de la amatoraj reloj de la e-movada trajno al la sciencaj. Sen scii la teorion almenaŭ supraĵe, legi la suban tekston estus malkompreno.

Estimataj membroj!

Nenio nova sub la luno. Mi elpaŝas same kiel iam en ASE-konferenco en Moskvo surbaze de Teorio de Sistemevoluo ("Sciencaj komunikaĵoj", Budapest, 1985/Julio, p. 5-17).

Multo en REU imitas la desuprisman politikon, kiu jam tutmonde antikviĝas... Desupre oni komisias suben la taskojn kaj plenumontojn. Laŭ la malnova hierarkia sistemo. Nun la rolon de la desupro plenumas la REU-Konferenco. Kion komisii, oni jam kolektas (mi ĵus ricevis Bultenon de REU, marto 2009) kaj al kiu komisii, oni vidos ene de la Konferenco mem.

En la menciita bulteno mi rimarkis sole ĉe Maksim Griŝin sciencan modernosisteman aliron al la problemo. El tiu la burokratan nivelon mi ne tuŝu, krom iom larĝigi: la prezidanto ankaŭ peru REU-informojn al superaj, same burokrataj, instancoj, foje reprezentu REU ekstere. Sekve en tiu rolo plej bonas iu moskvano.

Ĉe la dua Maksim'a strukturero (krea kaj agada nivelo) mi iom haltu. Maksim skribas "*... krei, subteni ĉefajn direktojn kaj projektojn de esp-istoj"*. La vorton "krei" mi ne ŝatus vidi – ĝi estas el desuprismo, ĉio kreiĝas mem, se aperas "lidero".

Pluraj samideanoj proponis en la bulteno multajn bonajn ideojn, sed kiuj ilin

efektivigos? Sen memanoncaj plenumantoj la bulteno plenas de revoj. La plej ĉefa problemo estas homaj fortoj, dezirantaj kaj kapablaj fari tion-alion.

Mi imagas la nunan REU-Konferencon jene. Kunvenas aktivaj esperantistoj. Parto el ili jam gvidas iujn movadajn terenojn aŭ projektojn. Alia parto jam scias anticipe kion li/ ŝi ŝatus fari en Esperantio enkadre de REU. Parteto de tiu parto ne nur scias, sed eĉ kolektis ĉirkaŭ si la dezirantojn kunlabori.

Post la raporto de la prezidanto pri la eksteraj rilatoj de REU, pri la financa stato, la parolon prenas aktivuloj. La taskohavaj samideanoj (ekz. klubestroj) rakontas sian laboron kaj sperton, la aŭskultantoj demandas kaj rekomendas, eble diskutas... Poste freŝaktivuloj rakontas sian memprenatan taskon kaj pri la kunlaborantoj (se tiuj ekzistas). La konferencanoj kontribuas per rimarkoj por pliperfektigi tiun taskon kaj alhelpi ĝin. Kompreneble, unu el la ĉefaj taskoj estas vivo/laboro de e-klubo. La kluboj ne bezonas gvidadon de REU-prezidanto. La klubestroj inter si notas la kunlaborprojektojn por la proksima jaro kaj anoncas ilin. Aparte gravas scii kiu klubo aŭ persono organizos proksimjare landan aŭ regionan e-aranĝon.

Ĝenerale la plej oportuna tempo por REU-Konferenco estus aŭtuno, sed ne fino de la studenta aŭ mezo de la kalendara jaro. Taŭgus ankaŭ decembro, kunigita kun la Zamenhof-festo.

Financoj: ĉiu klubo havas sian financon, same ĉiu projekto aŭ e-aranĝo.

Mi ne vidas sencon produkti plastumitajn neniondonajn membrokartojn, sed la REU-Jarlibro utilas kaj perfektigendas. La plej moderna kaj sekve la plej bona maniero, kiam e-istoj monkontribuu ne abstrakte al REU-kaso (kiu miapropone konsistu nur el prezidanto kaj unu-du helpantoj), sed al apartaj projektoj anoncataj publike (rete, en REGo...). La tuta mondo (Rusie: la Korĵenkov-entrepreno) jam sukcese uzas tian financan sistemon. Kial ni postrestu?

Mi antaŭ ioma tempo petis ĉe REU-prezidanto diskuti en la Estraro por subvencii al mi la elsiberian vojon al e-renkontiĝo por plurfoje prelegi pri interesaj e-temoj kaj malkovroj. La prezidanto respondis ne vidi sencon, ĉar laŭ li tutegale la estraranoj estos kontraŭ. Do ne nur REU-anoj, sed eĉ la estraranoj foje ne rilatas al REU-kaso, kiun ankaŭ mi, pensiulo, plenige perkotizas. Estus pli taŭgaj pluraj memstaraj kasoj, inter kiuj ekz. e-aranĝoj-kaso kiun povus pleniĝi profitoj el plifruaj aranĝoj.

Estu klara la tikla afero kiam iu samideano povas havi salajreton el sia e-projekto. Tio estas normala afero, dependa de la grado de samideana sindono, karitato kaj kompreneble videblaj sukcesoj. Denove ekzemplu por ni la *Sezonoj*-eldonejo. Vere ni vidas, ke la plejmulto da e-aktivuloj havas malsalajreton, proprapoŝe monumante siajn e-projektojn, kiel G.Ŝilo, G.Kokolija kaj V.Kudrjavcev. Por ili ne estis bezonata REU-estraro aŭ io simila.

Mi timas vane dezertokrii. Tiam la Konferenco perdegos tempon diskutante ideojn-revojn. Poste oni persvados unu la alian (devige) surpreni iun ideon-taskon. Fine oni elektos Prezidanton kaj estraranojn kies sekvajara baraktado estri-estrarani denove donos magrajn rezultojn. Kaj apude iujn rezultojn donos projektoj tute ne dependaj de REU-vertikala strukturoj kaj strukturestroj.

Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

GENERALOJ SEN ARMEO AŬ ARMEO DE GENERALOJ?

Oni volonte kritikas la Estraron de REU, akuzante ĝin pri nenionfarado. Nu, bone, sed la Estraro estas tia, kian elektis la Konferenco de REU. Evidente ĝi ne havis tiutempe pli taŭgajn kandidatojn, kiuj konsentis eniri la Estraron. Ĉu la nova Konferenco havos tiujn?

Kritikante, oni bonkutimas proponi. Do proponu viajn kandidatojn por labori. Se vi diras, ke X estas netaŭga homo, proponu la taŭgan (nur certiĝu, ke tiu konsentos).

Ekzistas ankaŭ opinio, ke nunaj estraranoj estas generaloj sen armeo. Sed armeo ja estas, ties oficiala parto eĉ mirinde kreskas ĉiujare. Tamen ĉiu homo havas proprajn ideojn kaj atendas, ke aliaj plenumos ilin. Vi mem povas imagi iun konatan esperantiston kaj tuj rememoros ideon, kiun tiu opinias la plej bona kaj kun kiu li/ŝi konstante aperas en retaj dissendoj, revuoj, paroloj ktp. Tio videblas sur ajna nivelo – ĉu en E-klubo, ĉu en landa agado.

Sed plenumantoj mankas. Mankas en nia armeo serĝentoj – tiuj homoj, kiuj efektivigos akceptitajn decidojn. Nia armeo konsistas plejparte el generaloj de penso.

La generaloj elpensas strategiajn planojn (jen aperis eĉ speciala retpaĝo), la amaso atendas konkretajn agojn, kaj... tio plu stagnas. Foje aperas agemaj homoj, kiuj sukcesas krei ĉirkaŭ si fortan klubon (tamen ne laŭ la strategiaj planoj, sed laŭ propra kompreno), sed tio daŭras nur dum la homo agemas. La sistemo ne funkcias kiel tuto.

> La urba konsilio aĉetis por la urbestro novan aŭtomobilon, tre luksan kaj impresan. Oni decidis prezenti ĝin al la publiko per granda solenaĵo, dum kiu la ĉefoj de la tri grandaj religioj benos la novan aŭton. Estis invititaj tiucele katolika pastro, protestanta pastoro kaj juda rabeno.
>
> Kiam venis ilia vico, oni vokis unue la katolikan pastron. Tiam li surmetis la kultajn vestaĵojn, ĉirkaŭiris la aŭton kaj trifoje aspergis sur ĝin sanktigitan akvon. Poste li laŭtlegis la religian benon.
>
> La dua estis la protestanta pastoro. Li malfermis la dikan Biblion, kiun li subbrake alportis. Li elektis fragmenton de la profeto Jeĥezkel, kiun li voĉlegis per konvinka tono.
>
> Nun venis la vico de la rabeno. Je la surprizo de ĉiuj ĉeestantoj li eltekigis mezgrandan segilon kaj kuŝiĝis kun ĝi sub la malantaŭa parto de la veturilo. Oni aŭdis bruon de segado. Post minuto li restariĝis kaj fiere montris al ĉiuj ekstremaĵon de la ellastubo...
>
> ***juda anekdoto de Josef Shemer***

Kaj kelkajn vortojn pri la fenomeno “necesas”. Kiam oni diras, ke “necesas fari tion kaj tion”, kion tio signifas? Kion kaŝas tiu frazkonstruo? ***Kiu*** devas fari tion, kio “necesas”? Laŭ mi, kiam aperas tiu vorto, ĝi devas tuj esti deĉifrita al unu el du variantoj: “mi intencas fari tion” aŭ “vi bonvolu fari tion”. Alikaze ĝi restas pendi en aero kiel revoj de Manilov. Ja se kelkaj homoj nur diras aŭ skribas unu al la alia “necesas fari ovaĵon” – la ovaĵo ne aperos.

Jurij Karcev (Uljanovsk)

MEMBROSTATISTIKO DE UEA EN 2008

En 2008 UEA registris la plej malgrandan nombron de individuaj membroj (IM) post la Dua Mondmilito: 5702, t.e. je 11 malpli ol la antaŭa malrekodo el 2002 kaj je 309 malpli ol en 2007. Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kiu pro la Jokohama UK estis la plej granda lando laŭ la nombro de IM en 2007, entute 856, sed en 2008 ĝi falis al 402. La perdo en Japanio estis do 454. Ĉar la tuta perdo estis 309, la cetera mondo kompensis do unu trionon de perdo en Japanio. Francio rekonkeris la unuan lokon kun 583 IM (+35); la dua estis Germanio kun 534 IM (+20). Do unu el kvin IM de UEA (19,5%) estis en tiuj du landoj.

Aliaj landoj kun multe da IM estis Brazilo (337; -7), Usono (314; -16), Nederlando (254; +5), Rusio (209; +58), Italio (208; +4), Belgio (159, +9), Svedio (154; -10), Britio (153; +4), Hispanio (147; +4), Finnlando (136; -20), Ĉinio (127; -14), Pollando (120; +20), Hungario (113; +13), Danio (97; +6), Svislando (85; +4), Ĉeĥio (82; +6), Vjetnamio (78; -5) kaj Kanado (75; +2).

La tuta membraro de UEA tamen kreskis per 706, ĉar la aligitaj membroj (AM) plimultiĝis el 11477 al 12492, dank' al Hungario, kiu en 2007 pagis por 100 AM sed en 2008 por 1348. (AM estas tiuj anoj de la landaj asocioj, kiuj ne estas IM de UEA.). Hungario liveris sume 1461 membrojn (IM+AM) kaj estis la lando kun plej multe da UEA-anoj. Aliaj landoj kun multe da AM estis Ĉinio (1051; +/-0), Germanio (832; +69), Italio (777; +40), Japanio (677; -314), Francio (553; +221), Pollando (500; +/-0), Belgio (480; -33) kaj Usono (341; -44).

Pozitiva estis la kresko de Societo Zamenhof al 166 anoj (+39). Revuo *Esperanto* havis 3860 pagitajn abonojn (-157) kaj *Kontakto* 845 (+100).

Gazetaraj Komunikoj de UEA

MEMBROSTATISTIKO DE REU

Fine de marto 2009 en REU (re)membriĝis 343 personoj. I.a. REU ekhavis du novajn dumvivajn membrojn: Jurij Manjaĥin kaj Steven Cobb (ambaŭ el Moskvo). Da dumvivaj membroj entute estas 51, individuaj: 70, familiaj: 8, aligitaj: 212 – pere de 13 kolektivoj. REJM-aĝaj estas 90 membroj.

Por komparo: rezulte de 2008 REU havis 50 dumvivajn, 108 individuajn, 15 familiajn kaj 233 aligitajn membrojn en 16 kolektivoj. Entute – 406 membrojn.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2009

DUMVIVAJ MEMBROJ

Cobb Steve (Moskvo), Manjaĥin Jurij (Moskvo)

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Alimov Artjom (Krasnodar), Andrejsons Sergej (Sankt-Peterburg), Borovkov Sergej (Krasnodara reg.), Ĉerneckij Nikolaj (Jaroslavla reg.), Jerkin Oleg (Vladimira reg.), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Kononenko Jevgenij (Samara reg.), Kopajev Jurij (Orjola reg.), Kotljarov Stanislav (Sverdlovska reg.), Kovaljova Valentina (Novosibirsk), Krasnokutskij Anatolij (Moskvo), Laptev Viktor (Ĉel-

jabinsk), Liĉavko Jevgenij (Belorusio), Maleĵ Ljubovj (Ivanovo), Morev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Muraŝev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Novikova Ljudmila (Moskvo), Obrezkov Andrej (Ivanovo), Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk), Sibirceva Valentina (Lipecka reg.), Sudakov Vladimir (Primorskij reg.), Taran Aleksandra (Krasnodar), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg)

FAMILIAJ MEMBROJ

Muraŝeva Varvara (Sankt-Peterburg)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

EK "Verda fajreto" (Ĉusovoj) (+2 membroj): *Jeljŝina Marija, Ŝirinkina Darja*

Klubo "Esperanto" de Jelec (+2 membroj): *Jaickaja Vera, Koljada Vera*

Moskva E-klubo "EK-MASI" (+18 membroj): *Burmistrova Jelena, Gamaleja Anna, Griĉik Andrej, Graĵdanova Oksana, Jakovlev Jegor, Ĵiĵerina Jekaterina, Kirpiĉjov Aleksandr, Kozlov Igorj, Kudrjaŝova Alla, Kudrjavcev Jevgenij, Mazurec Julija, Nikolajeva Natalja, Noskov Miĥail, Noskova Jekaterina, Orlov Sergej, Semjonova Natalja, Skrjabina Natalja, Smetanina Svetlana*

Murmanska Esperanto-klubo "Murmano" (+1 membro): *Jegorov Artur*

Samara Esperanto-organizo (15 membroj): *Agafonova Ljudmila, Aleksejeva Oljga, Alfjorova Jelena, Aljakina Ljudmila, Balabancev Maksim, Fejgin Igorj, Kaplun Jelizaveta, Koĉergina Rimma, Korĥov Eŭgeno, Kuznecova Jelena, Lisijenkova Valentina, Medvedeva Natalja, Prilepskaja Marija, Purigina Emilija, Suslov Vjaĉeslav*

Tiĥvina E-klubo (12 membroj): *Baraŝkov Vasilij, Belova Tatjana, Bistrova Margarita, Kaĉalova Zoja, Kirjakov Anton, Koroteckij Aleksandr, Loĵkina Jelena, Rajskaja Natalja, Tiĥomirova Oljga, Vlasova Darja, Vlasova Vera, Zdrogova Nadeĵda*

Uljanovska E-klubo (+3 membroj): *Agajev Marat, Jevina Tatjana, Tarubarova Jelena*

Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" (30 membroj): *Abisova Ljudmila, Ameljĉenko Iraida, Aptukova Sofja, Bezdeleva Galina, Ĉernova Marina, Ĉernozub Ljudmila, Dubrovskaja Ljubovj, Gorbunova Violetta, Karpeta Ljubovj, Kisljakova Svetlana, Koneva Galina, Kuznecova Larisa, Loginova Galina, Malinovskaja Galina, Matvejenko Valentina, Neunilova Nadeĵda, Paravin Valerij, Piljneva Dina, Polsina Galina, Rjabiĉkina Marina, Sannikova Larisa, Suĥanova Galina, Ŝeĥunova Ljudmila, Ŝeremetjeva Svetlana, Ŝlepĉenko Gennadij, Timĉuk Valentina, Tiŝĉenko Margarita, Titajev Aleksandr, Udovickaja Nadeĵda, Volkova Ljudmila*

Volgodonska E-grupo "Stipo" (5 membroj): *Afanasjeva Aljona, Afanasjeva Jelena, Fajzulin Grigorij, Koteljnikov Aleksandr, Koteljnikova Jekaterina*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2009

Individua kotizo – 120 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 12 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 3000 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 300 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 40 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM); la familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj aŭ dumvivaj membroj.

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio la sama kiel por la individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 40 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 200 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 230 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo kaj “Komencanto” sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <membreco@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

TEJO INFORMAS PRI ESTONTAJ ARANĜOJ...

Somera Esperanto-Studado (SES-2009) okazos inter la 10-a kaj la 18-a de julio 2009. Ĉi-jare – kun jam la dua fizika Lernu!-renkontiĝo! La aranĝon gastigas malgranda slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno. La programo konsistos el kelkaj partoj: antaŭtagmeze – instruado de Esperanto; posttagmeze – ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.; vespere – Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmospektado, diskoteko. Esperanto-instruadon gvidos spertaj E-instruistoj en 4-5 grupoj, laŭ la lingvonivelo. Fine de la aranĝo la partoprenontoj ricevos atestojn pri la 26-hora kurso laŭ la niveloj de nova Eŭropa referenckadro pri lingvo-instruado de A1 ĝis C1. Pliaj informoj: <http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index/php>.

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Usono okazos de la 29-a de junio ĝis la 17-a de julio 2009, ĉi-jare jam la 40-an fojon. Estas diversnivelaj Esperanto-kursoj de spertaj instruistoj, tri horojn tage. Eblas ricevi kredit-poentojn de la usona universitata sistemo (ĉar la kursoj estas oficialaj kursoj de "University of California, San Diego", kie la aranĝo okazos). Krom la kursoj estas bunta programo vespere kaj semajnfine. La kostoj estas iom grandaj, sed se vi ĉiuokaze iam volis studi en Usono, jen bona ebleco. (Kaj estas ebleco de stipendioj, ŝajne.) Jen la detaloj: <http://esperanto.org/nask>.

1-a (Internacia) Junulara Seminario okazos en Harbino, Ĉinio, la 23-an kaj la 24-an de majo. La temo estos "Junularo kaj Interpaciĝo", kaj la kunvenejo estos la Heilongjiang-a Scienc-teknika Instituto en Harbino. Legu pli: <http://tejo.org/eo/node/870>.

Germana Esperanto-Kongreso kaj 8-a Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos dum Pentekosto 2009 en Herzberg am Harz, Germanio); <http://tejo.org/eo/node/821>.

44-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 29-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (de la 12-a ĝis la 17-a de julio 2009, Juiz de Foira, Brazilo); <http://tejo.org/eo/node/833>.

2-a Kongreso de Serbiaj Esperantistoj (de la 26-a ĝis la 28-a de junio 2009, Jagodina); <http://tejo.org/eo/node/834>.

Aŭgusto 2009 – ***Itala Kongreso en Cassino***; <http://tejo.org/eo/node/819>.

Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Burundio (de la 10-a ĝis la 16-a de julio 2009 en Rumonge); <http://tejo.org/eo/node/831>.

TEJO-aktuale

E-KURSO EN SURGUT

La 20-an de februaro, post kelksemajnaj frostegaj kataklismoj, kiuj damaĝis normalan funkciadon de lernejoj en Surgut, startis finfine mia elementa fakultativa

kurso de Esperanto por lernantoj de la oka klaso. La 2-an de marto mi prezentis programon de la kurso laŭ la zagreba lernolibro en la lerneja pedagogia konferenco. La kurso, al kiu enskribiĝis 12 gelernantoj, ampleksas 52 45-minutajn instruhorojn kaj daŭros ĝis junio 2010 (unufoja leciono en la semajno). La baza metodo estas komunika metodo kun elementoj de aktiva agocentra personorientita instruado. La atingota lingvonivelo fine de la kurso celas egali al la nivelo A2 konforma al la komptentecoj de Eŭropaj referenckadroj.

Mi atendas de samideanoj salutmesaĝojn (taŭgas eĉ mallongaj salutvortoj) por pli efike motivi gelernejanojn je Esperanto kaj ĝia plezura lernado. La mesaĝojn eblas sendi al mia retadreso <surborde@mail.ru>.

Vladimir Opletajev (Surgut)

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO

La festivalo KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) denove okazos en Danio. Ĉifoje ĝi estos en la ĉarmega urbo de Hamleto (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør (Elsinoro). La datoj estas de la 7-a ĝis la 12-a de julio 2009.

Nun la 9-an fojon gejunuloj en Nordio aranĝas la Kulturan Esperanto-Festivalon, ĝis nun ĝi estis organizita en Svedio, Finnlando kaj Danio. Ĝi estas festivalo, kiu prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon.

KEF estas unika loko por la Esperanto-kulturo, kie Esperanto-artistoj povas renkonti unu la alian. Ĝi ankaŭ estas la loko kie vi povas interkonektiĝi kun la plureca vivo de la Esperanto-kulturo kiel spektanto de multaj koncertoj, teatraĵoj kaj literaturaj prezentoj. Sed vi ankaŭ mem povas partopreni aktive en multaj metiejoj. Interalie vi povas lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron, legi kaj fari komiksojn, ludi en Esperanto, ktp. Nur en KEF vi povas ekz. karaokei en Esperanto, ne kun maŝino, sed vivante kun la artistojn mem, partopreni la unuan rokbandon por infanoj (se vi estas infano) aŭ fari la unuan cirkon en Esperanto!

> Pola judino Dwejra feriis kun sia edzo ĉe la montaro. Post la reveno demandis ŝin la amikinaro: "Ĉu la pejzaĝo tie estis bela?" Respondis ŝi: "Eble bela, sed oni ne vidas la pejzaĝon, ĉar la montoj kaŝas ĝin."
>
> ***juda humuraĵo de Josef Shemer***

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj distros la partoprenontojn. Jam nun ni scias ke venos: Ĵomart kaj Nataŝa, Martin Wiese kaj "Talpoj", "Hotel Desperado", "La Perdita Generacio", "Pafklik" kaj "Inicials D.C.", sed multe pli da artistoj estos anoncitaj en la hejmpaĝo. Dum nokto Flo de "Vinilkosmo" estros la diskotekon kun dancmuziko nur en Esperanto. Cetere vi povos spekti filmojn en Esperanto, kaj entute ĝui la plej grandan aranĝon kun Esperanto-kulturo.

La festivalo estas festivaleja laŭ sia formo, tiusence ke oni loĝos primitive kaj tial la kostoj ne estas tro altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi pli lukse kontraŭ aldona kosto en migrulhejmo aŭ en hotelo.

En la semajno tuj antaŭ KEF en Danio okazas la plej granda Rokfestivalo en Nordeŭropo – Roskilde Festivalo. La dana E-junularo organizas senpagan Esperantan renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboros 24 horojn en la DEJO-budo, en 3

okhoraj periodoj. Dum la resto de la tempo vi povos festi kun la aliaj, aŭskulti koncertojn kaj eĉ gajni monon por partopreni KEF.

Vidu ĉe <www.kef.saluton.dk> pri pli da detaloj, la diversaj metiejoj kaj kotizoj.

(per-esperanto-kulturo)

PRINTEMPA RENKONTIĜO EN HANOJO

Ĉiujare, je la alveno de printempo, Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) okazigas Printempan Renkontiĝon. La ĉi-jara renkontiĝo – la 9-a – okazis dimanĉe la 22-an de marto 2009.

Jam antaŭ la malfermo la artistoj de "Nova Sunbrilo" – klubo, apartenata al Yumejho-sekcio de Hanoja Esperanto-Asocio, per viglaj, ĝojaj kantoj alportis novan sunlumon al la kunveno. Ĉeestis: s-roj Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario; Nguyen Minh Toan, eksa ĝenerala sekretario; Thieu Quang Dieu kaj s-ino Nguyen Phuong Mai, vicprezidantoj; kaj multnombraj membroj de diversaj sekcioj, kluboj de VEA kaj HanEA. Rimarkindas la partopreno de usona esperantisto de japana deveno, s-ino Tomoko Yamashiro, vizitinta Hanojon kiel turisto.

F-ino Trinh Hong Hanh, estrino de la klubo KOVELI, prezentis la celon de la renkontiĝo. S-ro Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario, informis pri la aktivadoj de VEJO kaj pri la intenco de s-ro Osmo Buller, Ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA, viziti Hanojon por vidi la lokajn kondiĉojn kun la celo ebligi al UEA decidi, ĉu Vjetnamio estos akceptita kandidatiĝi por gastigi UK-on en 2012. Li ankaŭ mallonge informis pri la malfermo de nova Esperanta kurso en la Fremdlingva Universitato, pri la nove starigita Esperanto-klubo en mezlernejo de Nguyen Sieu, pri la ĵus aperinta vjetnama versio de la lernolibro "Zagreba Metodo", kun gramatikaj kaj leksikaj partoj en la vjetnama.

Speciale rimarkinda estas la traduko kaj enretigo de la Deklaro de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj (VUAO) protestanta kontraŭ la decido de la usona supera kortumo malakceptinta la plendojn de la vjetnamaj viktimoj de oranĝa agilo/dioksino kontraŭ la kemiaj kompanioj en Usono. Nur 2 tagojn post aperigo de la informo, ni ricevis pozitivan reeĥojn de 9 esperantistoj el la mondo (4 el Japanio kaj po 1 el Koreio, Italio, Germanio, Serbio kaj Ĉeĥio). Tio estas grava kontribuo de VEA al la popola diplomatio.

Okaze de tiu renkontiĝo ekzempleroj de la numero 1/2009 de la bulteno "Verda Mesaĝo el Vjetnamio" (informilo de KOVELI-klubo) estis disdonitaj. Sinsekvaj artaj programeroj kun kvizoj, rekompencitaj per donacetoj, varmigis la etoson. Komuna fotado fermis la kunvenon.

(landa agado)

ESPERANTO SUR 64 MILIONOJ DA BALOTILOJ!

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10-a de aprilo, la germana sekcio de la politika movado "Eŭropo – Demokratio – Esperanto" (EDE) rajtas partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de junio la germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝos ĝia nomo. Ankaŭ la nomoj de la 10 kandidatoj de EDE-Germanio – kun prof. d-ro

Reinhard Selten sur la unua loko – troviĝos sur ĉiu voĉdonilo.

EDE starigas listojn ankaŭ en ĉiuj regionoj de Francio, tiel ke entute ĉ. 108 milionoj da eŭropanoj povos subteni la disvastigon de Esperanto per siaj voĉoj. Dum en Germanio ĉiu voĉdonanto aŭtomate trovos EDE sur la balotilo, en Francio oni bezonos specialan voĉdonilon. EDE planas presigi kaj disdoni 7 milionojn da ili, kaj krome oni ofertos la eblecon elŝuti ilin el Interreto.

En Germanio entute 32 partioj kaj politikaj asocioj partoprenos la balotojn – pli ol iam ajn antaŭe. Jam nun ĵurnalistoj publikigis la opinion, ke tiu ĉi abundo povus instigi la grandajn partiojn akcepti ideojn de la novaj politikaj movadoj. Tial ankaŭ EDE esperas, ke ĝia baza ideo, plibonigi la kompreniĝon pere de Esperanto kaj tiamaniere akceli lingvan egalrajtecon kaj demokration sur eŭropa nivelo, ekhavos novajn impulsojn.

Pro la partopreno en la balotoj EDE povos senpage elsendi varbajn filmetojn en la germana kaj franca televidoj. Krome oni klopodas multe informi ekzemple pere de afiŝoj, faldfolioj, informstandoj kaj gazetaraj komunikoj. Eĉ se (pro la neceso superi la 5 %-an sojlon en Germanio kaj Francio) la ricevo de seĝo en la parlamento ne ŝajnas esti realisma, nun milionoj da homoj ekscios pri la ekzisto de Esperanto, tiel ke certe ankaŭ la ĝenerala Esperanto-movado profitos de la balotoj.

Laŭ realisma takso, EDE povos atingi en Germanio kaj Francio sume ĉ. 100.000 voĉojn. Jam tia nombro certe pli impresus la eksteran mondon ol la membronombro de la diversaj Esperanto-asocioj en Eŭropo. La eŭropaj balotoj do povos grave helpi en tio, ke oni prenos la Esperanto-movadon pli serioze.

Ulrich Matthias (vicprezidanto de EDE-Germanio)

MALPROKSIMA VOJAĜO


Vespere Kruko kaj Baniko paŝas (iom malfirme) tra la stratoj, revene de la drinkejo.

Kruko subite diras: Mi ŝatus iam vojaĝi al Meksikio.
Baniko: Ĉu Meksikio? Ĝi estas tro malproksima.
Kruko: Kial vi diras tion?
Baniko gestas ĉielen: Nu, mi scias ke la Luno estas pli proksima ol Meksikio.
Kruko: Kiel vi povas diri tian stultaĵon?!
Baniko: Tute ne stultaĵo! Vidu, ni povas vidi de ĉi tie la Lunon, sed ne Meksikion!

(esperanto-anekdotoj)

LIBROSERVO DE UEA VENDIS POR 125125 EŬROJ

Kun 349 ekzempleroj la gvidilo "Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA", lanĉita en la 93-a UK, estis la plej furora titolo de la Libroservo de UEA en 2008. Ĝi ne estis aĉetebla dum kvin jaroj, kio akumulis tian bezonon, ke en kvin monatoj ĝi saltis al la pinto de la tutjara statistiko. Post ses jaroj sur la unua loko, "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker (229) estis la tria; la duan lokon okupis la adresaro de Pasporta Servo (284). Furoris ankaŭ la artikolaro de Ulrich Lins pri la historio de UEA, "Utila Estas Aliĝo" (214), aperinta en la antaŭlasta tago de UK.



Ses pliaj libroj atingis pli ol 100-ekzempleran kvanton: la ekzercilo "Poŝamiko" de B.Allée kaj K.Kováts (186), "Gerda malaperis!" de Claude Piron (181), la gvidilo pri la kvartalo de la CO "Tuj apude" de Humphrey Tonkin (170), la enkonduka libreto "La Komuna Eŭropa Referenckadro" (145), la elementa lernolibro "Saluton!" de A.Childs-Mee (107) kaj "Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj" de R. Bolt (106).

La vendoj sumiĝis je 125125 eŭroj (122420 en 2007). Estis venditaj 13707 ekzempleroj de 2554 malsamaj libroj kaj diskoj, ne enkalkulante insignojn, glumarkojn k.s. Entute 662 klientoj aĉetis poŝte aŭ surloke en la CO almenaŭ unufoje dum la jaro, sed tiu nombro ne inkluzivas la klientojn de la kongresa libroservo dum la 93-a UK.

Pli detalaj informoj pri la vendoj en 2008 aperis en la marta numero de la revuo "Esperanto".

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Mikaelo Bronŝtejn

La urbo Goblinsk [1]

24.02.199..., merkredo

La kulo, versimile, estis freneza. Mirakle reviviĝinta en vintro, ĝi estis evidente malsata kaj pro tio agresema. Ĝi zumis naŭze, netolereble iom for de la kapo, poste descendis abrupte kaj ĝia akuta zumo ekmolestis la maldekstran orelon. Maksim, kuŝanta sur la dekstra flanko, volvis per litkovrilo la tutan korpon, krom la kapo, do ĝuste tiun ĉi objekton la kulo elektis por siaj atakoj, celante vespermanĝi. Maksim sufiĉe forte frapis per manplato la orelon, sed la kulo forŝvebis supren kaj entreprenis novan atakon. Kvin aŭ ses atakoj finiĝis senrezulte por la kulo, kaj la vespermanĝo dume restadis nur revo por ĝi, sed Maksim rezulte havis bruon en la maldekstra orelo, kelkfoje batita.

Eva dormis en alia ĉambro – estis ŝia antaŭdujara decido apartiĝi en la propra lito kaj en la propra ĉambro por ne aŭdi, ŝiadire, fojfojan ferocan ronkadon kaj nemaloftajn sonĝokriojn de la edzo. “Bone, – diris Maksim. – Kiam vi bezonos min, voku”. “Sed se vi bezonos min?” – demandis Eva. “Mi toleros...” – Maksim respondis, kaj ekde tiam ili kuniĝis nur ĉe ŝia deziro kaj nur en ŝia lito. Cetere, estis bona solvo, pensis Maksim nun, – almenaŭ Eva ne ĉeestas tiun stultan ofensivon kontraŭ la kulo. Ankaŭ Pavlik ne aŭdis, li estis kviete dormanta en sia infanĉambro, la tria ĉambro de l’ apartamento.

Maksim ellitiĝis, nudpiede, penante esti senbrua, iris en la necesejon, prenis tie ŝvabrilon kaj revenis en la ĉambron. Kun risko veki Eva-n li ŝaltis la lumon kaj tuj ekvidis la kulon, orgojle sidantan sur plafono ĝuste super la kuseno. Verŝajne, ankaŭ la damnita kulaĉo rimarkis lin, ĉar, ĉe l’ unua ŝvabrilmovo supren, ĝi momente startis kaj malaperis ie en koridoro. Maksim metis la ŝvabrilon apud la liton, fermis la pordon al la koridoro, enlitiĝis kaj preskaŭ tuj ekdormis.

Sed la kulo venis ankaŭ en lian sonĝon. Komence ĝi estis kulo kulsimila, pretiĝanta por atako surplafone. Maksim vidis ĝin klare kaj detale. La facetitaj okulaĉoj avide traserĉis la liton, la ventro, kiu en sata stato similus ruĝan oblongan bereton, nun estis griza, ŝrumpinta kaj moviĝanta supren – malen, la malsata rostreto senpacience pulsadis. “Ĝi malaperos, – pensis Maksim ensonĝe, – ja same, ekdormante foje post tuttaga fungoserĉado, mi spektas boletojn, plej allogajn, kiujn mi ne trovis en realo”.

Sed la kulo ne malaperis. Kontraŭe, ĝia zumo akiris parolsimilecon, la rostro ekpulsis, iel mirinde ripetante movojn de lipoj ĉe parolado, kaj super la rostro Maksim, jam sen miro, trovis nigrajn lipharetojn. Io tre konata reliefiĝis en la trajtoj de la kulo, sed dume ne estis kompreneble, kiu ĝi estas, tiu kulaĉo. “Via kompreno pri

[1] Ĉapitro el la nova romano. Antaŭaj ĉapitroj el tiu ĉi verko estis publikigitaj en REGo №№ 3 (40), 3 (46), 5(48). (La red.)

la proprieto egalas tiun de papuoj!" – ekzumis la kulo. – "Fordonu vian sangon!" Tion zumante ĝi falis sur la orelon de Maksim kaj senprokraste enpikis la rostreton en la orellobon. Nature, Maksim ne povus vidi ĝin – sed ja li vidis, vidis kvazaŭ deflanke kaj desupre! La kulo eksuĉis, farante korpomovojn, avide konvulsiajn, kaj komencis abrupte ŝveli – ĉe tiu ŝvelado ĝiaj trajtoj iĝis pli kompreneblaj por Maksim, kaj post ia ensonĝa momento li jam definitive certiĝis, kiu estas la kulo. Sur lia orelo sin instalis senceremonie Viĉjo Sigaev. Lia ŝvelanta kula postaĵo premegis la kapon de Maksim, kaj la rostro duondiafana, pli kaj pli longa kaj larĝa, senĉese elpumpadis ruĝon el la orellobo. Ie tre fore, kie la rostro havis komencon, abomene briletis kaj konspire palpebrumis du brunaj okuletoj.

- M-m-m! – ekĝemis Maksim sufiĉe laŭte, streĉante la tutan forton por turni la kapon. – M-mi ĉi-ion kompre-enas! La-asu mi-in dormi!

Kulo Viĉjo ekmurmuris malkontente kaj disigis siajn ses krurojn, alprenante pli firman pozicion. Maksim faris plian desperan provon turni la kapon, sed ne sukcesis. Solvo de la problemo venis lian kapon abrupte, fulme – li etendis la dekstran manon supren, al la brunaj palpebrumantaj okuletoj, kaptis la lipharojn kaj svinge ektiris al si. Kulo Viĉjo eligis strangan animŝiran ekjelpon kaj renversiĝinte falis dorsen sur la plankon. Maksim impete saltis for el la lito, kaptis la ŝvabrilon, levis ĝin super la kapo, preta bategi...

Trans flavetaj ornamdesegnaĵoj de la pordovitro aperis febla lumo de noktolampo, kaj Maksim ekkonsciis sian vekiĝon, des pli ĉar sur la planko antaŭ li estis nenio krom tapiŝo. Por kelkaj sekundoj li kvazaŭ stuporiĝis kun atence levita ŝvabrilo – en tiu pozo lin trovis Eva, elirinta el sia ĉambro.

Ŝi surmetis helverdan noktoĉemizon kun diverskoloraj papagetoj. Ŝia bruna hararo estis taŭzita, la blugrizaj okuloj sen ŝminko rigardis al Maksim kun mireto. De ŝia korpo, ĵus ellitigita, fluis varmo tiom paciga kaj hejmeca, ke Maksim honte mallevis la ŝvabrilon kaj la okulojn.

- Dek minutoj post la dua, – Eva rigardis la murhorloĝon. – Kion do vi sonĝis ĉi-foje? – Ŝi aliris lin kaj metis varman manplaton sur lian frunton. – Temperaturo normala...
- Ĉu ankaŭ vian infanvartejon oni privatigos? – Maksim metis la manojn sur la ŝultrojn de Eva kaj enrigardis ŝiajn okulojn.
- Aĥ, jen do kio... – flustris Eva, kisinte lian nerazitan vangon. – Ne, mi aŭdis, ke oni planas entute likvidi ĝin. Nu, iru ni en la kuirejon, mi varmigos por vi herban teon.
- Kiel likvidi? Kial likvidi? Kia stultaĵo! – haste flustrokriis Maksim. Li enpantofligis la piedojn kaj ekpaŝis akurate, sen bruo, sekvante la edzinon.

Laŭvoje Eva enrigardis la ĉambron de Pavlik. La knabeto dormis, sed li estis dormanta jam renversiĝinte – la piedoj troviĝis tie, kie devus esti kuseno, sed la kuseno – falinta surplanken, samkiel la litkovrilo. Eva levis la kusenon kaj metis ĝin sur la liton, tenere levinte la kapon de Pavlik. Ankaŭ la litkovrilon ŝi levis kaj zorgeme kovris la filon. Tiu, evidente, nun sonĝis ion dolĉan – li ridetis kaj movetis la lipetojn, kvazaŭ maĉante.

- Jen – filo de sia patro... – flustris Eva al Maksim, ĉeporde observanta la

tutan proceduron. – ... same militas dumdorme.

En la kuirejo Maksim denove ekflustris:

- Do rakontu! Kiu elpensis likvidon de la infanvartejo?
- Nur vian uzinon kaj vian esperanton vi konas, nenion pli! – respondis Eva de ĉe gasforno.
- Pavlik jam estas triajara lernejano, do la infanvartejon mi ne vizitas dum jaro kaj duono, – rezonis Maksim. – kial mi malhelpu vian direktorinan agadon? Esperanto neniom malhelpas al vi, eĉ iom helpas – rememoru nian ĉarman vojaĝon en Francion! Kaj la uzino estas nia subteno, nia nutranto, nia...
- ... distro, – rapide intervenis Eva, – se konsideri viajn drinkvesperojn en SKE...
- Nur tri festetoj jare! – defendis sin Maksim. – Tiu antaŭ Novjaro, la vira tago februare kaj la virina – en marto. La kolektivo devas amikiĝi kaj amiki...
- Ankaŭ gastaro... ekzemple tiuj francoj, – Eva plenigis tasojn per vaporanta herba teo; Maksim rimarkis, ke ŝiaj manoj tremetis. – Cetere, pri amikiĝo. Kiel fartas tiu... via sekretariino?
- Kial vi min demandas? – en la voĉo de Maksim eksonis embarasiĝo. – Viĉjon demandu – estas lia sekretariino.
- Ĉu vere? – Eva mokridetis. – Sed mi opiniis, ke estas tutuzina sekretariino... Lidia Andrejevna, nia najbarino, flustretis al mi hieraŭ, ke vi estis kun tiu... en provizvendejo... antaŭ kelkaj tagoj, jes. Kaj ke vi estis tenata je kubuto, akceptante tion kun plezuro...
- Nu-u! – rediris Maksim, perrigarde esplorante fundon de sia taso. – Pri plezuro – inflama fantazio de nia estimata najbarinjo... Sed mi vere vizitis vendejon kun Irina – ni aĉetis provizon kaj vodkon. – Viĉjo eĉ “Volgon”[1] liveris por tio... Eble ni tamen ĉesu ekskandali kaj revenu al via infanvartejo?

Li malrapide englutis teon du aŭ tri fojojn, levis la kapon kaj rigardis en la okulojn de Eva. Ŝi faris movon per du fingroj de la maldekstra mano – la dikfingro kaj la longa – de la okulrandoj al la nazo, forviŝante du gutetojn, kaj respondis al lia rigardo.

- Bone, – ŝi diris. – Se eĉ “Volgon” li donis... Sed pri la vartejo – estas banala ŝanĝo de posedanto. Mankas infanoj nun – ne multaj stultulinoj naskas... Posedanto de la konstruaĵoj estas la urbodomo, do tie oni decidis likvidi du aŭ tri vartejojn, kiuj ne havas normokvanton de infanoj. La infanoj iros en aliajn vartejojn, sed la liberajn ejojn la urbodomo disponigos al gravaj instancoj. Onidire jam estas decido, ke en la mia lokiĝos la imposta inspektistaro. Do verŝajne baldaŭ vi restos la sola salajrato en nia familio...
- Vica stultaĵo... – diris Maksim enpensiĝinte. – ... ja ne ĉiam daŭros tiu

[1] Leĝera aŭtomobilo, produktita en USSR.

bordela stato. Iam la naskado denove kreskos – ĉu oni redonos la ejojn?
- Dubinde... – respondis Eva.
- Kien do ĉio ruliĝas?! – Maksim premis la kapon per ambaŭ manoj. – Jen ankaŭ nia Viĉjo vagadas ie, en la kontoro aperas neofte, des pli en la metiejoj. Onidire, li traktas privatigon de "Rusoplast"... mi provis demandi lin senpere, sed li... li pene eligis konspiran rideton kaj diris, ke ne havas nun tempon por klarigoj. Ke mi ĉion ekscios, kiam venos la tempo.
- Ne ofendiĝu, karulo, sed vere viaj pensoj vagas en iu elpensita mondo, eble esperantista... Kaj via reala vivo pasas nur ĉe kelkaj objektoj. Mi supozas, ke vi eĉ ne scias, ke la ŝtato komencis disdonadon de vaŭĉeroj[1]...
- Ne troigu, Eva, – diris Maksim. – Tion mi aŭdas po centfoje ĉiutage. Ankaŭ la gazetaro ne preterlasas...
- Sed kiam vi planas ricevi la vian?
- Kial hasti? Ĝis aprilo mi rajtas ricevi kiam ajn.

Fintrinkinte, li gestis al Eva, ke ŝi alverŝu plian teon. Eva ne rapidis – ŝi estis pensanta pri io.

Silento, ia prema, stulta, obtuza silento ŝvebis en la kuirejo tro longe, eble dum kvin minutoj aŭ pli. Poste Eva diris:

- Mi iomete varmigu la teujon... Mi ricevis mian vaŭĉeron hieraŭ. Tute apude, en la sesa domo oni povas ricevi. Do jen. Ĉe la elirpordo tie vaĉas kelkaj gejunuloj kaj petas la elirantojn vendi siajn vaŭĉerojn. Kvar milojn ili proponas...
- Kvar milojn?! – Maksim faris la okulojn rondaj. – Estas botelo da vodko! Eĉ la nominala prezo de vaŭĉero estas dek miloj, sed ja ili tie en la supro promesis, ke ĝi eble kostos poste du "Volgojn"! Ĉu vi vendis?
- Mi – ne, – respondis Eva. – Sed tre multaj vendas. Homoj ne scias, kion endas fari kun tiuj paperaĉoj, sed jen – tuja mono... Tio estas enurbe, do mi imagas, kio okazas en vilaĝoj...
- Hej, mi komprenis! – ekkrietis Maksim, frapinte sian frunton per manplato. – Jen do kial Viĉjo sendadas ĉiutage Eŭgeĉjon kun kamiono, disportanta niajn plastaĵojn al vilaĝaj butikoj... Por aĉetadi la vaŭĉerojn!
- Sed por kio tion bezonu via Viĉjo?
- Por kio, por kio... Por akiri pli da akcioj! Ruzulo! Sed morgaŭ mi skuetu lin!.. Aj, ne. Ĝis la semajnfino li fuĝis Peterburgon oficvojaĝe. Des pli bone! Mi voĉigu tiun demandon marde dum la planumo!
- Voĉigu, voĉigu... – diris Eva tute senespere. – Sed nun iru en la liton. Ĉar la morgaŭo jam alvenis. Post kelkaj horoj vi devas iri al la buso...

Si alproksimiĝis kaj kisis lian frunton.

- Kiel mortinton vi kisis... – komentis Maksim kun amara rideto.

Eva volis respondi, sed subite frape eksonoris la telefono. Maksim salte atingis la aparaton en la koridoro, por eviti ripetan eksonoron, kaj kaptis la aŭskultilon.

---

[1] Provizora dokumento, donata al ĉiu civitano de Rusio kiel garantio por posta akiro de akcioj dum privatigo de ŝtataj entreprenoj.

- Ĉu vi deĵoris ĉetelefone? – diris la aŭskultilo per la laŭĉiame trankvila sed iom strangeta voĉo de Lazar.
- Mi ne dormis, – respondis Maksim. – Fraĉjo via... – li diris flanken al la demanda rigardo de Eva, kaj returnis la kapon al la aŭskultilo. – Kio okazis, Lazar?
- Mi tamen konjektas ke vi ne estas vestita, – daŭrigis Lazar samtone, – ĉar virina spiro aŭdeblas... Salutu mian franjon, reportu ŝin en liton, sed mem eĉ ne pensu pri apudiĝo. Vestu vin, Seniĉkin jam veturas al vi per deĵorbuseto.
- Mi ne komprenas, Lazar, – diris Maksim incitiĝante. – Jen vi ŝercas, jen vi sendas al mi la buseton. Kio okazis, finfine?
- Ĉu vi volas tragedion tuj kaj senprokraste? – rediris Lazar. – Do mi diru al vi, ke granda tragedio ne okazis. Bonŝance. Ĉion ceteran vi ekvidu mem, post la alveno.

La aŭskultilo eligis kurtajn signalojn. Maksim metis ĝin kaj iris en la ĉambron por vesti sin. Li nenion diris al Eva, kiu sekvis lin, post kontroli la infanon. Sed trovinte ke ŝi staras apude kun demando en la okuloj, li nervume movis la ŝultrojn.

- Mi ne scias, kio okazis, – li diris. – Ia paneo. Eble akvodukto glaciiĝis... tamen dubinde – ne estas granda frosto. Iru, enlitiĝu kaj dormu trankvile. Ankaŭ vi havos labortagon, sed mi verŝajne revenos matene por dormi kelkajn horojn.

Sen voki lifton, Maksim salte descendis per ŝtuparo al la unua etaĝo. Jen gimnastiko, li pensis. Ĉe la enirejo jam vaĉis la buseto kun Seniĉkin enkajute, metinta la kapon sur la stirilon. La kajuto plenplenis je postebria fiodoro.

- Seniĉkin! – diris Maksim, elmontrante ekmiron kaj malkontenton. – Ĉu vi drinkaĉis dum la deĵorado?!
- Mia deĵorado ekas je la noktomezo, – elgrumblis Seniĉkin kun rebata malkontento, pene levante la kapon kaj ŝaltante la motoron, – sed mi konsumis – nur ducent gramojn! – je la sesa kun mia kuzo. Mi rajtas.
- Ne al mi, al GAI-anoj[1] vi klarigu tion, se ili vin haltigos por ke vi spiru en la tubeton! – rediris Maksim.
- Nu, ĉefo, ne-e! – diris Seniĉkin preskaŭ gaje. – Estas vi, kiu baldaŭ devos ion klarigi al policistoj... al inspekciistoj... al prokuroro – al ĉiuj. Pri du fingroj... pri viaj muldmaŝinoj ankaŭ... kiu scias – eble iaj viaj piŝtoj misfunkciis, do kulpulo estos vi. Eblas ankaŭ, ke la elektro ie – tiam via Lazar kulpos! Ne mi...
- Kiuj du fingroj?! – demandis Maksim.
- Du fingroj de tiu stultulino... Makejeva... nu, el la nokta muldista alterno, ĉu vi konjektas, pri kiu mi?.. Tiu, kun la mamegoj! – Seniĉkin montris la dimension kaj volonte transiris al klarigoj. – Du fingrojn ŝi ŝovis en la muldilon, inter tiuj feraĉoj, – mi ne scias, kiel vi nomas la merdaĵojn, – sed ili subite kunpremiĝis! Ha, kiel ŝi blekis! Stultulino! Oni instruas ilin,

---

[1] GAI – rusia vojpolico.

ŝtipkapulinojn, instruas... instruas, sed ili nenion komprenas! Ne ŝovu la fingrojn, dum la maŝino funkcias! Ne ŝovu, malŝaltu, tamen ne – ŝi ŝovaĉas!..

Li parolis kaj parolis, sakrante kaj ĵetante amason da obscenaĵoj, tiom verve, ke Maksim komprenis ĉion kaj intervenis la paroladon de Seniĉkin per tono, ne havanta eĉ guteron da dubo:

- Eĥ, Seniĉkin, Seniĉkin... Nu, bone, vi drinkas, ĉar poste vi havas ŝancon dormaĉi surstirile ĝis la mateno. Sed vane vi la muldistinojn regalas – ili devas labori ja...
- Ĉu mi regalas?! – indigniĝis Seniĉkin, bremsinte kun abruptego, ĉe kiu la buseto turniĝis kaj haltis transverse sur la silenta vojo. – Ne estas mi, kiu regalas! Ili min regalas, se vi volas scii, ĉefo!.. – Li komprenis, ke diris nedirendaĵon kaj daŭrigis jam alitone. – Tutegale vi nenion pruvos. Ankaŭ mi nenion diris al vi.
- Ne tio gravas... – respondis Maksim. – Ĉu la fingroj... ĉu ili restis?
- Restis... – elspiris Seniĉkin kontente. – Preskaŭ bonŝancis ŝi eltiri ilin ĝustatempe. Restis la fingroj – nur sen la ungoj... Ne plu gratos ŝi min nokte... ha-ha!

Klara Ilutoviĉ

La 1-a de marto – la Internacia tago de katoj



L' internacia tag' de katoj –
Kortuŝa, ĉarmoplena festo
De niaj plej enigmaj fratoj.
Bonfartu la mirinda besto!

Ĉu homoj aŭdas melodion
De gustoj, movoj kaj aromoj?
La kat' komprenas multe plion
Ol ŝajnas al saĝuloj – homoj.

Bonvolan varmon flugigante,
En kvazaŭ homa konsolemo
La kat' ronrone, lule, kante
Dispelas nubojn de korpremo.

La kato petas kaj rakontas;
Kurackarese varmas felo;
La kat' postulas, trompas, hontas

Dum voj' al la loganta celo.

Sindona bonhumorigulo,
De l' hom' amiko kaj amato –
En ajna hejm' kaj terangulo
Plej digne vivu ĉiu kato

Sen persekutoj kaj malsato
En l' agresema efektivo!
Renkontas hejme min la kato,
Kaj mi ridetas al la vivo!

Laboro de vortaristo

La leksikografo ekflamis plendi,
Obstine kirlante vortmaron:
"Por kio krimulon al bagno sendi?
Devigu lin fari vortaron!"

Facilas kritiki ĝin ĉiuflanke.
Ĉu al korektad' venos fino?..
Mutego okulojn plu tranĉas manke –
Jen vere bagneca destino!

Ĉu neologismo? Ĉu pravigeblas?
Ĉu vere fidindas vorteroj?
Problemoj svarmegas, la menso feblas,
Kaj lasas vigligaj esperoj.

Forglitas nuancoj de vortsignifoj,
Certecon l' uzad' ne donacas,
Kaj ĉiam pli multe da lingvaj rifoj
Dum voj' laŭ vort-ondoj minacas.

Kontraŭaj informoj el gravaj fontoj
Misgvidas. Ĉu mezoj ekzistas?
Diskutu-disputu pri sencopontoj.
La lingvomedio rezistas.

Ne trompu vin ŝajna laborkomforto
En lingvokirliĝo impeta,
Venkadu ĝin plu ĝis la lasta vorto –
Kaj ĉu la vortar' estos preta?..

“In memoriam...”

Nin rekrutis la tempo
Por la mond’ malmodela.
En benata printempo
Ĉiu estis fidela
Al aspiroj kaj moroj
De la verda ĝarden’ kaj
Al amikoj fervoraj
En bataloj senvenkaj.

Jes ni strebis kunigi
Ĉion, kio necesis...
Ve – la mondon bonigi
Tamen ni ne sukcesis.
Eble nun kun malŝato
Diros iu profano,
Ke ni padon post pado
Konkeradis en vano.



Stasis Gaidamaviĉius



Lena Zaznobina

Tamen juĝu nun dio
Pri praveco de l’ diro.
Mia generacio
Saĝe, antaŭ foriro,
Ne reagas al mokoj,
Kalumnioj, kritikoj,
Sed reagas al vokoj
De sinceraj amikoj.

Por ni gravas, – ho ve! – ke
Ŝrumpas nia ĝardeno.
Nin elsarkas forbeke
Tempobird’. Sen reveno
Jam foriris en tristo
Al la glora paseo
Ljonja, Lena, Aristo,
Olga, Slava, Staseo…